

EL POPOLA ĈINIO

外文出版社
出版部
出版科



Maj.
1953

La Nuna Tasko de la Ĉina Laboristaro

La jaro 1953 estas jaro kiam nova Ĉinio komencas sian grandskalan, laŭplanan ekonomikonstruadon, kaj la ĉina laboristaro pli ol iam antaŭe sentas la gravan signifon celebri ĉiaran Majtagon—la granda festo por la tutmonda laboranta popolo. Kun senlima memfido ili surŝultrigas la honoran taskon plenumi ĉiaran konstru-planon kaj varme ili bonvenigas la Sĉpan Tutlandan Labor-kongreson okazigotan de la Tutĉina Federacio de Laboristoj je la 2-a de majo.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj, sub la gvidado de sia propra partio—la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina laboristaro travivis la provadon kaj forĝadon de longtempa serioza, revolucia batalo kaj jam fariĝis forta, unuiginta armeo. Dum la kontraŭ-imperiisma kaj kontraŭ-feŭdisma revolucia movado de la ĉina popolo, la heroo ĉina laboristaro ĉiam batalis ĉe la plej antaŭa fronto, unuigis kun la tutlanda popolo, renversis finfine la regadon de la Usona imperiismo kaj ĝia lakeo Ĉiang Kaj-ŝek, kaj akiris grandan venkon en la liberiga afero de la ĉina popolo.

Depost la fondiĝo de nova Ĉinio, la ĉina laboristaro tuj sin ĵetis, kun la sama spirito de heroeco kaj per-

sistemo, en la batalon sur la ekonomia fronto kaj en la mallonga periodo de tri jaroj, sub la sincera, mal-avara helpo de Sovetunio, revivigis kaj disvolvis la nacian ekonomion detruitan de longa milito, tiel stariĝante bonan fundamenton por la industriigo de nia lando.

La ĉina laboristaro kaj la tutlanda popolo bone scias ke por firmigi la venkon de la revolucio, riĉigi la landon kaj ĉiam plialtigi la vivnivelon de la popolo, estas necese tuj komenci grandskalan, ekonomian konstruadon. Ili ankaŭ bone komprenas ke pliprodukto kaj ŝparo estas la sola socialisma vojo por akumuli kapitalon por nacia konstruado. Tial, la tutlanda laboristaro respondas kun kreskanta fervoro la alvokon de Prezidanto Maŭ faritan en 1952 por la movado de pliprodukto kaj ŝparo. En lasta jaro nur la laboristoj en la kvar grandaj administraj regionoj, Norda, Nord-orienta, Orienta kaj Nordokcidenta Ĉinio krom plenumi difinitan produkt-taskon, kreis por la lando riĉaĵon sufiĉan por konstrui fervojojn 25,000 kilometrojn longan aŭ cent kotonŝpindelojn kun po 50 000 spindeloj.

En tiu ĉi jaro la patriota laborkonkurso tre vige progresas tra la tuta lando, celante la plialtigon de produktado, la ŝparon de materialoj, la elfasadon de latentia industria forto, la pligrandigon de ekipaĵo-utiligo kaj la plialtigon de labor-produktivo. Samtempe la ĉinaj laboristoj plintensigas sian lernadon pri tekniko. En Fera-Ŝtala Kompanio de Anŝan sola, 5,000 ordinaraj laboristoj fariĝos teknikistoj kaj 30,000 ordinaraj laboristoj fariĝos spertaj laboristoj en la daŭro de kvin jaroj. Dum la disvolvigo de la movado de pliprodukto kaj ŝparo la laborprotekto kaj labor-sekurigo ricevis sufiĉan atenton kaj estos plidivastigataj en la diversaj industrioj kaj inter la laboristoj. Paralele kun la plialtigo de produktado la materiala kaj kultura vivo de la laboristoj kaj laborantoj ankaŭ pliboniĝas. En la pasintaj tri jaroj la salajroj de la laboristoj plialtiĝis je 60-120 procentoj sed la varprezoj ĉiam restas stabilaj. La Labor-Asekura Regularo estas efektivigita tra la tuta lando, kaj, la amendamento, kiun oni faris al ĝi en januaro ĉijare, ne nur plimultigis la ŝueblajn bonojn, sed ankaŭ donas eblecon al pli da laboristoj kaj laborantoj profiti ilin. Granda nombro da novaj laboristaj loĝejoj kun modernaj instalaĵoj konstruiĝas en diversaj industriaj urboj. Koncerne la kulturen vivon, miloj da senpagaj, libertempaj lernejoj provizas la laboristojn per kultura kaj teknika edukado en diversaj gradoj. La distra kultur-agado de la laboristoj ankaŭ alprenas pli kaj pli riĉan enhavon.

La brila ekzemplo de la socialisma konstruado en Sovetunio estas forto, kiu ĉiam instigas la ĉinan laboristaron kaj la tutan ĉinan popolon marŝi antaŭen. La ĉina popolo alte taksas kaj arde amas sian eminentan civilizacion kun longa historio. Samtempe ili ankaŭ komprenas ke Sovet-



Ŝtalfabrika

Ksilografajo de Jen Han

la Tria Volumo de la

Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung

La tria volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung* estas eldonita de la Popola Eldonejo sub la direktado de la Eldona Komitato de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio. Ĝi disvendiĝas ekde la 10a de aprilo en ĉiuj lokoj tra la lando.

En la tria volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung* estas kolektitaj la verkoj skribitaj de kamarado Maŭ Ze-tung en la daŭro de marto de 1941 ĝis aŭgusto de 1945 kiam la Kontraŭjapana Milito triumfis. Ili estas: *Antaŭparolo kaj Postskribo al 'Esploro de Kamparo'*, *Reformu Nian Lernon, Pri la Internacia Unuecfroto kontraŭ Faŝismo, Ĝustigu la Labormanieron de la Partio, Kontraŭbatalu la Partian Formulisman, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jen'an, La Turnopunkto de la Dua Mondmilito, Pri Ekonomiaj kaj Financaj Problemoj dum la Kontraŭjapana Milito, Kelkaj Problemoj pri Gvidmetodo, Disvolvu la Kampanjojn de Rentoredukto, Produkto kaj Subteno al la Registaro kaj Amo al Popolo en la Bazlokoj, Organizigu, Lerno kaj Politika Situacio, Ni Nepre Devas Ellerni Ekonomian Laboron, Pri Koalicia Registaro, Malsaĝa Maljunulo Translokigis Monton, Pri Armea Memprovido per Produktado kaj pri la Graveco de la Du Kampanjoj de Ĝustigo de Manieroj en Lernado, Verkado kaj Laborado kaj de Produkto, Pri la Danĝereco de Hurley-politiko kaj aliaj traktatoj.*

Reformu Nian Lernon, Ĝustigu la Labormanieron de la Partio kaj Kontraŭbatalu la Partian Formulisman — tiuj ĉi tri paroladoj estas la fundamentaj verkoj de kamarado Maŭ Ze-tung pri la kampanjo de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laboro. En ĉi

tiuj verkoj kamarado Maŭ Ze-tung resumis la ideologian radikon de la diverĝaj partiaj linioj en la pasinteco, analizis la etburgajn ideojn vaste ekzistantajn en la partio kaj subjektivisman agmanieron kiu spegulas la etburgajn ideojn kaj montris, ke ĉi tiu kontraŭscienca, kontraŭmarksisma agmaniero estas granda malamiko de la proletaro kaj de la popolo kaj tio signifas nepurecon de partieceo. Kamarado Maŭ Ze-tung propagandis energie dialektikan materialismon kaj historian materialismon kaj elmontris la direkton, "Lernu el la pasinteco por singardi kontraŭ la estonteco kaj kuracu la malsanon por savi la malsanulon", por solvi la problemojn pri ideoj en la partio. La kampanjo de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laborado ricevis grandan rezulton, ĝuste kiel diris kamarado Maŭ Ze-tung en sia fama verko *La Nuntempa Situacio kaj Niaj Taskoj*: "Tiu ĉi rezulto konsistas ĉefe el tio ke niaj gvidaj organizoj kaj multaj kadroj kaj partianoj pli bone mastras tiun ĉi fundamentan direkton pri la apliko de la ĝenerala vero de marksismo-leninismo al la konkreta praktiko de la ĉina revolucio." El la kampanjo de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laborado rezultis senprecedenca solidareco kaj unueco de la partio sur la ideologia bazo de marksismo-leninismo.

La Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jen'an fare de kamarado Maŭ Ze-tung solvis sisteme la disputojn longtempe ekzistantajn en la movado de moderna literaturo de Ĉinio per marksismo-leninismo. Tio estas grava rezulto de la granda disputo inter la ideoj proletaj kaj etburgaj en literaturaj kaj artaj problemoj. Tiu ĉi parolado de kamarado Maŭ Ze-tung

unio havas la plej progresintan sperton kaj ĝiaj scienco kaj tekniko multe superas tiujn de iu ajna kapitalista lando. Tial ili lernas de Sovetunio kun altgrada entuziasmo. Sub la sincera helpo de Sovetiaj specialistoj, sennombraj ĉinaj laboristoj jam ellernis progresan teknikon de Sovetunio kaj kreis novajn rekordojn en produktado. De nun ni ankoraŭ pli energie lernos de Sovetunio.

El sia propra sperto la ĉina laboristaro kaj la tuta ĉina popolo lernis ke nia konstrulaboro ne povos akiri sukceson sen la subteno de la internacia laboristaro kaj ke longdaŭra mondpaco estas treege valora kaj necesa por nia klopodo. Pro tio la ĉina laboristaro kaj la tuta ĉina popolo dum nacia konstruado firmtenos

por ĉiam neskieblan amikecon kaj interhelpon kun la popoloj de Sovetunio kaj la novdemokratioj. Ili ankaŭ donos konstantan prizorgon, simpatian kaj subtenon al la laboristo-fratoj kaj aliaj laborantaj popoloj, kiuj, sub la kapitalista sistemo sin okupas pri la justa batalo por paco, plibonigo de labor- kaj viv-kondiĉoj kaj defendo de siaj rajtoj. Ni ankoraŭ pli decideme efektivigos la decidojn de la Pakkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj kaj la Monda Popola Pakkongreso, plifortigos la pacan kaj demokratan tendaron kun Sovetunio ĉe la kapo, unuiĝos pli intime kun la tutmondaj laboristo-fratoj kaj la tuta progresema homaro kaj batalos por la longdaŭra paco en Azio kaj en la tuta mondo.

forigis multe da eraroj kaj konfuzoj pri literaturaj kaj artaj problemoj kaj enkondukis novan historian epokon por la movado de ĉina popola literaturo.

En *Kelkaj Problemoj pri Gvidmetodo* kamarado Maŭ Ze-tung, resumante la spertojn en la movado de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laborado kaj samtempe resumante la spertojn en la longdaŭra gvidado de revolucia laboro de nia partio, donis plej bonan klarigon pri la fundamenta metodo de gvida laboro.

Pri Ekonomiaj kaj Financaj Problemoj dum la Kontraŭjapana Milito, Disvolvado la Kampanjojn de Rentoredukto, Produkto kaj Subteno al la Registaro kaj Amo al Popolo en la Bazlokoj, Organizigu, kaj Ni Nepre Devas Ellerni Ekonomiajn Laboron k.c. estis la fundamenta programo de la partio en gvidado de la produktkampanjo en liberigitaj regionoj. Pri problemoj ekonomiaj kaj financaj kamarado Maŭ Ze-tung kondukis dufrontan batalon: unuflanke ĉefe kontraŭ konservativa vidpunkto kiu algluiĝis al en- kaj elspezaj problemoj de financo, ignorante ekonomian disvolviĝon; aliflanke kontraŭ nepraktigebla granda projekto kiu senbaze parolis pri disvolviĝo ignorante la konkretajn kondiĉojn de tempo kaj spaco. Laŭ teorio pri la altiro de kamparanaro al socialismo per la vojo de kooperado kaj resuminte la spertojn de la originala produkt-kooperado de ĉinaj kamparanoj (kiel laborinterŝanĝo ktp.) kaj tiajn spertojn en la ruĝaj regionoj dum la Dua Enlanda Revolucia Milito, kamarado Maŭ Ze-tung montris al ni la direkton de agrikultura kolektiva labororganizo surbaze de individua ekonomio (ne tuŝante la fundamenton de privata propraĵo de individuo), laŭ la memvolo de la kamparanoj kaj konforme al la nuntempaj historiaj kondiĉoj.

En *Pri Armea Memprovizo per Produktado kaj pri la Graveco de la Du Kampanjoj de Ĝustigo de Manieroj en Lernado, Verkado kaj Laborado kaj de Produkto*, kamarado Maŭ Ze-tung resumis la historian signifon de la du kampanjoj dirante: "La ĝenerala kampanjo de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laborado kaj tiu de produkto, komenĉigintaj en 1942 kaj 1943 unu post la alia ludis kaj ludas decidan rolon respektive en vivo spirita kaj vivo materia. Tiujn ĉi ĉenerojn se ni ne kaptus ĝustatempe, ni neniel kaptos la tutan ĉenon revolucion kaj nia batalado ne povas plu progresi." La kampanjo de ĝustigo de manieroj en lernado, verkado kaj laborado metis por nia partio ideologian fundamenton por la triumfo de ĉina popola revolucio kaj tiu de produktado en la liberigitaj regionoj pretigis materian fundamenton por tiu venko.

La Turnopunkto de la Dua Mondmilito estis skribita de kamarado Maŭ Ze-tung en la komenco de oktobro, 1942 kiam la heroo defendado al Stalingrado venis al la plej grava momento. En tiu ĉi traktato kamarado Maŭ Ze-tung antaŭvidis la grandan venkon de la ruĝa armeo de Sovetunio kaj asertis: "Tiu ĉi batalo estas ne nur la turnopunkto de la milito inter Sovetunio kaj Germanio, kaj eĉ ne nur la turnopunkto de tiu ĉi kontraŭfaŝisma mondmilito sed la turnopunkto de la historio de la tuta homaro."

Lerno kaj Politika Situacio resumis fundamente la historion de la partio dum la Kontraŭjapana Milito.

En tiu ĉi traktato, kamarado Maŭ Ze-tung, laŭ la ŝanĝo de proporcio inter la revolucia kaj kontraŭrevolucia fortoj, antaŭvidis la eblecon por la ĉina popolo progresi de venko en la kamparo al venko en la urboj; la eblecon progresi de venko en izolitaj bazlokoj al unuigo de ĉi tiuj bazlokoj, kaj fine al venko tutlanda. Kamarado Maŭ Ze-tung elmontris ke por akiri kaj firmigi la venkon de revolucio la Ĉina Komunista Partio nepre devas deteni sin de fiereco kaj klopodi por mastri la marksisman metodon por analizi aferon.

En sia politika raporto *Pri Koalicia Registaro* farita en la Sepa Tutlanda Kongreso de Reprezentantoj de la partio, kamarado Maŭ Ze-tung resumis ĉiuflanke la spertojn en la dulinia batalado inter la Ĉina Komunista Partio kaj Kuomintang dum la ok jaroj de la Kontraŭjapana Milito kaj elmetis programojn ĝeneralan kaj konkretan por unuigi la tutlandan popolon por venkbatalo. Sekvante *Pri Nova Demokratio'n* ankaŭ tiu ĉi raporto havis grandan efikon en la mobilizado de tutlanda popolo.

En la Sepa Tutlanda Kongreso de Reprezentantoj de la partio, kaj en la verkoj postkongrese skribitaj, kamarado Maŭ Ze-tung elmontris emfaze la reakcian politikon de la Usona registaro helpi la reĝimon de Ĉiang Kaj-ŝek kaj kontraŭi la Komunistan partion, antaŭdiris la danĝeron ke la Usona imperialismo ludos la rolon de agresanto en Ĉinio anstataŭ la japana imperialismo, kaj alvokis al la tuta partio sin pretigi ideologie por kontraŭbatali la invadon de la Usona imperialismo al Ĉinio por ke ili ne konsterniĝu antaŭ eventuala nova akcidento.

Al la tria volumo de la *Elektitaj Verkoj* estas aldonita la *Rezolucio pri Kelkaj Historiaj Problemoj* farita de la vastigita Sepa Plena Kunsido de la Sesa Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio. Tio estas detala konkludo de la Centra Komitato pri la eraroj de la "maldekstra" oportunisma linio en la partio de la komenco de 1931 ĝis 1934. Tiu ĉi dokumento donis koncizan klarigon pri la eminentaj atingoj de kamarado Maŭ Ze-tung en solvado de la problemoj de ĉina revolucio per teorio kaj metodo de marksismo-leninismo.

La Tuta Popolo de Ĉinio

Bonvenigas la Trian Volumon

de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung

Ekde la 10a de aprilo la tria volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung* disvendiĝas en ĉiuj lokoj tra la lando. Tiumatene kiam la pordoj de la librejoj ankoraŭ ne estis malfermitaj, antaŭ ili jam atendis granda nombro da homoj. Multaj organizoj aĉetis kolektive. Nur la Ĉina Popola Universitato en Pekino aĉetis 3,000 ekzemplerojn. Je la sama mateno neĝeroj flirtis en Lanĉoŭ, urbo en Nordokcidento, tamen antaŭ la pordo de Sinhua-librejo tie ankoraŭ viciĝis kolonoj da aĉetantoj de la tria volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung*. Ĝis la presiĝo de nia gazeto la librejoj de ĉiuj lokoj tra la lando jam disvendis pli ol du milion ekzemplerojn.

Akra Kontrasto ĉe Panmunjom

Raporto de Nia Speciala Korespondanto pri la Interŝanĝo de Malsanaj kaj Vunditaj Militkaptitoj en Koreio laŭ Sia Propraokula Vidaĵo

Estis tragika sceno.

El Usonaj ambulancoj haltantaj en la korea-ĉina akceptejo por hejmen revenantaj malsanaj kaj vunditaj kaptitoj, aperis grupo post grupo da terure marasmaj figuroj, plejparte amputitaj kaj fakte ĉiuj lamantaj. Kavaj okuloj en multaj palaj vizaĝoj estis malsekaj de larmoj. Malgraŭ sia malforteco, tiuj ĉi postvivantoj de la teruraĵoj de Koĵe- kaj Ĵeju-kaptitejoj kolektis sian tutan forton por forlasi la Usonajn veturilojn kiel indaj soldatoj de la popolo. Sed en la proksimaj desinfektaj tendoj kie ili estis subtenataj aŭ portataj de korea-ĉinaj akceptantoj, multaj jam ne plu povis reteni sian spasmoploradon. Flegistinoj kaj doktoroj ilin konsolis: "Ne malĝoju! Vi jam revenis al viaj propraj kamaraĵoj."

Matene de la 20a de aprilo la unuaj koreoj alvenis, portante nur ĉemizojn, kvankam la ilin eskortantaj usonanoj ĉiuj portis batalkampajn jakojn por sin protekti de la malvarma vento. Estis surprize, ke ĉiu reveninta korea soldato portis regulan kepon de la Korea Popola Armeo kun provizore farita insigno sur ĝi. Kelkaj eĉ havis malgrandajn naciflagojn alpinglitajn sur siaj kepoj, ĉiuj faritaj de ili mem kaj portataj spite de perfortaj minacoj de usonanoj.

Usona "Humanismo"

Revenintaj ĉinaj volontuloj rifuzis kunporti objektojn donitajn de la usonanoj. Kiam ili elpaŝis el Usonaj ambulancoj, multaj forŝiris siajn jakojn kaj ilin ĵetis teren. Unukruruloj forjetis lambastonojn nove donitajn de la usonanoj kaj klopodis saltiri sur unu kruro al la tendoj. Unu el ili eĉ demetis siajn ĉemizon kaj pantalonon kaj ilin forĵetis. Multaj kaptitoj teren ĵetis *manĝaj-ladskatolojn* al ili donitajn survoje al Panmunjom. Acide odoranta manĝaĵo el fabo kaj tritikaĵo disŝprucis antaŭ la usonanoj.

Multaj koreaj kaj ĉinaj kaptitoj faris naciflagojn el ĉiritaj ĉemizoj aŭ tukoĵ tuj post kiam ili eniris ambulancojn por la mallonga vojaĝo al Kaesong. Ili ligis flagojn al lambastonoj kaj flirtigis ilin ekster la fenestroj de la veturiloj. Koreoj komencis kanti la *Kanton de Kim Il Sung* kaj la ĉinoj, *Kanton de la Ruĝa Flago de la Unua de Oktobro*. La lasta estis komponita en Ĵeju-kaptitejo post la masakro de la unua de oktobro en lasta jaro, en kiu pli ol cent sesdek ĉinaj kaptitoj estis mortpafitaj de la usonanoj pro celebrazo de la Nacia Festo.

Kiel Iliaj Kaptitoj Reiris

Nur sescent jardojn for de tie, korea-ĉinaj ambulancoj estis liverantaj Usonajn, britajn, turkajn, Kanadajn, Sudafrikajn, Aŭstraliajn, grekajn, Nederlandajn, Kolombiajn kaj Sudkoreiajn malsanajn kaj vunditajn kaptitojn. Ne-koreoj eliris el la ambulancoj kun brilaj, ruĝvangaĵ vizaĝoj. Ili estas vestitaj per

bluaj uniformoj netaj kaj varmaj, kun dikaj lankovriloj sur iliaj ŝultroj. Kelkaj Usonaj kaj britaj kaptitoj mansvinge adiaŭis la korea-ĉinan personaron kaj ĵurnalistojn. Ni aŭdis komentojn el la arego da freneze okupataj Usonaj fotistoj kaj ĵurnalistoj: "Tiu ĉi estas bonforma," "ili ĉiuj ŝajnas bonformaj". La malmultajn amputitojn, la korea-ĉinaj fortoj provizis per bran-kardoj. Sudkoreiaj kaptitoj aspektis same sanaj kaj bonstataj.

Tiu ĉi akra kontrasto inter la du akceptejoj, fakte, rimarkiga en ĉiuj fazoj de la interkonsento de interŝanĝo de malsanaj kaj vunditaj kaptitoj, kiu estis subskribita je la 11-a de aprilo post kvintaga diskutado ĉe Panmunjom.

Mi akompanis la unuan eskorton portantajn nekoreajn malsanulojn kaj vunditojn de Pjoktong ĉe Jalurivero al Kaesong. Antaŭ ol la malsanuloj kaj vunditoj el diversaj kaptitejoj kolektiĝis ĉe la difinita loko, la kaptitejaj aŭtoritatoj jam provizis sufiĉe da manĝaĵo kaj trinkaĵo por ke la kaptitoj celebru la eventon. Ili estis permesataj reporti kun si ĉiujn siajn personaĵn posedaĵojn kaj malgrandajn valorajojn.

Nia Grandanima Interpreto pri la Interkonsento

La korea-ĉina flanko donis la plej grandaniman interpreton pri la amplekso de "malsanaj kaj vunditaj". La hejmen-reirantoj estis plejparte kazoj de frostiĝo, malsanetoj aŭ vundoj ricevitaj antaŭ kaptiĝo. Ili inkludis viron kiu suferis etan ostarompon en futbalkonkurso kaj viron kiu iomete vundiĝis pro falo sur glacio.

La eskorto de dudek ambulancoj kun flirtantaj ruĝaj flagoj kaj kun ruĝaj paneloj forlasis Pjoktong post kiam vigla preparado estis farita por certigi ke la tritaga vojaĝo suden estu kiel eble plej komforta sub milittempaj kondiĉoj. Kuracistoj kaj flegistinoj akompanantaj la eskorton kunportis medikamentojn kaj kirurgiajn ekipaĵojn por eventuala bezono sur la vojo. Du provizaj ĉarĝaŭtoj kun enladigita laktopulvoro, biskvitoj, kukoj, fruktoj kaj trinkaĵoj sekvis la ambulancojn.

La eskorto pasis tra urboj kaj vilaĝoj alniveligitaj al la tero de la Usonaj aer-piratoj. Tamen la militkaptitoj estis provizitaj per komfortaj tendoj ĉe la lokoj kie ili tranoktis. Tiu ĉi eskorto iris glate laŭ vojo kiun la Usona aer-armeo detruadis tutforte dum tri jaroj kaj ĝi senprokraste atingis Kaesong laŭ originala plano. Tie oni havigis al la ne-koreaj kaj Sud-koreiaj militkaptitoj plenan ripozon kaj laŭeble ilin provizis per ĉiaj komfortaĵoj, medicina servo kaj amuzoj.

Besteco ĝis Lasta Minuto

Sed la Usonaj kaj anglaj ĵurnal-raportoj donis tute alian bildon pri la koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj

(daŭrigo sur p. 102)

La Supereco de la Elekta Sistemo de

La 1-an de marto, 1953, Prezidanto Maŭ Ze-tung de la Centra Popola Registaro publikigis *La Elektan Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko por la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Lokaj Popolaj Kongresoj Ĉiurangaj*. Tio estas historie signifoplena okazaĵo en la politika vivo de nia lando. Se la komencita unua kvinjar-plano de nia landkonstruo markas novan etapon de la evoluo de niaj ekonomio kaj kulturo, la publikigo de *La Elekta Leĝo* markas plian antaŭenpaŝon al perfektado de popoldemokratio en nia lando.

La ĝenerala spirito en *La Elekta Leĝo* estas: starigi vere demokratian elektan sistemon konforme al la nunaj, konkretaj cirkonstancoj en nia lando.

Universala Elektro en Vera Senco

Nia elekta sistemo montras la universalecon de la elekta rajto. *La Elekta Leĝo* difinas ke ĉiu civitano de la Ĉina Popola Respubliko, kiu atingis la aĝon de 18 jaroj, havas rajton elekti kaj elektiĝi sen distingo de nacieco, raso, sekso, profesio, socia origino, religia kredo, edukiteco, kvanto de havaĵo kaj daŭro de loĝado. Por efektiviĝi tiun universalan elektadon, en *La Elekta Leĝo* estas faritaj precizaj kaj necesaj difinoj por la elekto de virinoj, diversnaciaj popoloj, popolaj armeanoj kaj la elmigrintaj ĉinoj en eksterlando. Pro tio nia elekto estas universala elekto en la vera senco. Sendube, la diversrangaj popolaj kongresoj naskitaj sur la bazo de tia universaleco havas plej vastan reprezentadon por la popolo.

La Voĉdonantoj Estas Ĉiuj Egalrajtaj

Nia elekta sistemo montras la elektan egalrajtecon. *La Elekta Leĝo* difinas, ke ĉiu elektanto aŭ elektantino partoprenas la elektadon surbaze de egalrajteco. Ĉiuj civitanoj atingintaj la aĝon de 18 jaroj havas elektan rajton sen ajna limigo. Ilia egala demokrata rajto estas plene protektata. Kaj ĉiu elektanto havas nur unu voĉon.

La Elekta Leĝo ankaŭ difinas la nombron de la delegitoj elektendaj por diversaj lokoj sur bazo de la nombro de loĝantoj, samtempe konsiderante pri la regionoj kaj la multeco aŭ malmulteco de la loĝantoj. La nombro de delegitoj por la popolaj kongresoj de vilaĝoj, urbetoj kaj distriktoj apartenantaj al municipoj estas difinita tute laŭ la nombro de la lokaj loĝantoj. T. e. en la popola kongreso de vilaĝo, urbeto, aŭ distrikto apartenanta al municipo, ĉiu delegito reprezentas samnombrajn loĝantojn. Delegitoj por gubernia popola kongreso elektiĝas el la vilaĝoj kiuj apartenas al la koncerna gubernio. Sed estas difinite ke vilaĝo eĉ kun plej malmulta loĝantaro ankaŭ devas havi delegitojn, kaj ke vilaĝo eĉ kun plej multa loĝantaro ne rajtas elekti pli ol tri delegitojn. Ĉirilate, analoge estas ĉe la elektiĝo de la provincaj popolaj kongresoj kaj la Tutlanda Popola Kongreso.

La delegitaro por la Tutlanda Popola Kongreso nombras ĉirkaŭ 1200 personojn. Tiu ĉi nombro estas iom malpli granda ol la sumo de la delegitoj de la

Akra Kontrasto ĉe Panmunjom

(daŭrigo de p. 101)

vojaĝantaj norden el Koe kaj Ĵeju. Ili estis malpermesataj fari celebran antaŭ foriro. Ĉe la Pusan-doko, ĉinaj militkaptitoj okazigis "sid-strikon" por postuli "pli bonan trakton flanke de UNO-gvardio". La usonanoj, kiel kutime, eligis gas-grenad-fusilojn kun bajonetoj por minaci ilin. Pli poste la militkaptitoj denove faris dudek-kvar-horan malsat-strikon por postuli plibonigon de siaj manĝoj. Samtempe la militkaptito-komando de la Usona armeo publikigis preskaŭ ĉiutage raportojn pri murdoj kaj masakroj en diversaj kaptitejoj inkluzive tiun sur Jonĉo-insulo kie kvardek naŭ militkaptitoj estis murditaj aŭ vunditaj je la 17a de aprilo.

La aktuala interŝanĝo de malsanaj kaj vunditaj militkaptitoj komenciĝis je la naŭa, matene de la 20a de aprilo. Usonaj veturiloj venis en la korea-ĉinan akceptejon kondukate kaj sekvate de militpolicianoj kun kaskoj kaj kunportantaj klabetojn—evidente spertaj buĉistoj el la Ĵeju- kaj Koe-buĉejoj. Kiam la pordo de la Usona ambulanco malfermiĝis, dik-grasaj Usonaj oficiroj kaj malgrasaj militkaptitoj prezentis unu el la plej naŭzaj kontrastoj kiujn oni povas vidi. Kaj jen estas kelkaj vero-donaj ciferoj kompilitaj ĝis la tria tago de interŝanĝo: Inter 550 revenintaj koreaj-ĉinaj militkaptitoj enloĝitaj en unu el la provizoraj hospitaloj en Kaesong, unuapaŝa medicina ekzameno montras ke

221 estis kripligitaj kaj 189 el tiu kripliĝis rezulte de nesufiĉa aŭ absoluta manko de medicina zorgado en la Usonaj milit-kaptitejoj; inter 192 pacientoj sub la kategorio de "ĝenerala malsano" en tiu ĉi hospitalo, 109 suferis de tuberkulozo kaŭzita de malbona nutraĵo kaj peza laboro.

Nekredeblaj suferoj finfine ĉesis por tiuj ĉi homoj kiam ili trapasis la pin-arkon—kie flirtis la korea kaj ĉina naciflagoj kaj pendis granda standardo: "Venu al la Patrolando"—kiu staris antaŭ la korea-ĉina akceptejo ĉe Panmunjom. Urgaj malsanoj ricevis tujan prizorgon tie en tendo. Ambulancoj kuris inter Kaesong kaj Panmunjom por veturigi la revenintojn al san-centro kie oni havigis al ili hartondon, banon kaj, plej ekscite, novajn vestojn por anstataŭi la Usonajn. Granda kaj kompetenta medicina laborantaro nun funkcias en Kaesong, kaj tio ĉi nur estas la unua paŝo en la granda laboro reporti proksimume ses mil viktimojn de la Usona "humanismo" al la vojo de sano.

Bonvenigo de la Popolo

Bona medicina prizorgo estas akompanata de varma bonvenigo. Centoj da Kaesong-aj civitanoj—la plejparto de la virinoj estas bele vestitaj—kolektiĝas antaŭ la san-centro ĉiutage por saluti la revenintojn kiam ili alvenas de Panmunjom. Donacpaketoj estas disdonataj. Artistaj trupoj kaj film-grupoj vizitas ĉiutage la provizorajn hospitalojn. Bonvenigaj kunvenoj estas okazigataj.

Nova Ĉinio

ambaŭ parlamentoj en Sovetunio, sed multe pli granda ol la nombro de la parlamentanaro de iu ajn alia lando. Tio estas konvena por nia lando en la nunaj kondiĉoj.

Popoldemokratia Diktatoreco Plifortigas

Nia elekta sistemo montras ke nia ŝtato estas ŝtato de popoldemokratia diktatoreco. Ĝi celas la firmigon kaj plifortigon de la popoldemokratia diktatoreco sub la gvido de la laborista klaso kaj sur la bazo de la laborista-kampana alianco.


La *Elekta Leĝo* difinas por urbo kaj kamparo malsamajn loĝantar-proporciojn laŭ kiuj la delegitoj elektigas. Ĝi difinas, ke po 800 mil loĝantoj en provinco elektas 1 delegiton por la Tutlanda Popola Kongreso, sed en industria urbo po 100 mil loĝantoj elektas 1 delegiton por la Tutlanda Popola Kongreso. Ĉar urbo estas centro de politiko, ekonomio kaj kulturo, kaj estas ejo kie sin trovas laboristoj kaj industrio, la difino pri la malsamaj loĝantar-proporcioj por la elekto de delegitoj el urboj kaj vilaĝoj ĝuste spegulas la gvidan rolon de la laborista klaso en la ŝtato, kaj samtempe elmontras ke nia lando estas evoluanta al la direkto de industriigo.



Perspektivo de sano, laboro kaj paca vivo en hejmlando rapide transformas tiujn fantom-similajn figurojn aperintajn el Usonaj ambulancoj ĉe Panmunjom en gajajn grupojn da junuloj, kvankam ĉiu vizaĝo ankoraŭ portas senerare videblajn markojn de neimageblaj suferoj sur Koe kaj Ĵeju-insuloj.

La bildo sur la alia flanko de la linio estas denove rimarkinde malsama. En la Usona akceptejo mem en Panmunjom multaj ridetantaj Usonaj, anglaj kaj aliaj militkaptitoj eliris el registro-tendoj kun melankoliaj mienoj. La "medicina" laborantaro de la Usona armeo probable faris ekzamenajn decidojn tie rilate ilian "mensan taŭgecon" por vidi ĵurnalistojn aŭ iri hejmen.

En la antaŭvespero de ilia reiro tra Panmunjom, iu Usona militkaptito eliris la ĝeneralan penson: "Ŝajnas ke Onklo Sam restigos nin en "hospitalo" por longa tempo, se ne por eterne". Sinman-Rhee-naciperfiduloj superis sian Usonian mastron anoncanta oficiale ke la revenintaj Sudkoreiaj militkaptitoj ricevos ses monatojn da "reedukado" kaj dum tiu periodo eĉ korespondo kun familioj kaj amikoj estos malpermesata. Se la Usonaj senhontuloj kaj la Rhee-pupoj atingos kion ili volas, la alternativo al longa periodo de deteno por reenpatriigita Usonaj kaj Sudkoreiaj militkaptitoj estos evidente la tute senbaza mensogado pri la stato en korea-ĉinaj militkaptitejoj por Usona propaganda celo. Sed vero, kiel montrita en la frapaj kontrastoj en Panmunjom kaj aliloke, ne povas esti kaj ne estos nuligita.



Vic-ĉefministro Teng Siaŭ-ping, membro de la Projekta Komitato, klarigas pri la Elekta Leĝo al la 22a sesio de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro antaŭ diskutado pri ĝi.

La *Elekta Leĝo* difinas konvenajn nombrojn de delegitoj por minoritatoj kaj popolaj armeanoj en la diversrangaj popolaj kongresoj, ekz. la popolaj armeanoj devas elekti el si 60 delegitojn por la Tutlanda Popola Kongreso. Ĝi ankaŭ difinas ke la elmigrintaj ĉinoj en eksterlando, kiuj nombras ĉirkaŭ 11 milionojn, devas elekti el si 30 delegitojn por la Tutlanda Popola Kongreso. Tio spegulas la prizorgon de la patrio al la eksterlande loĝantaj gefiloj.

Kiel supredirite, la diversrangaj popolaj kongresoj naskitaj laŭ la difinoj de *La Elekta Leĝo*, korekte spegulas la aktualan vivon kaj klasrilatojn en nia lando ke ĉiu nacio kaj ĉiu klaso de la socio havas siajn delegitojn en la diversrangaj popolaj kongresoj nombre konvenajn al ilia pozicio. Do nia *Elekta Leĝo* estas por la plifirmigo de la granda unuiĝo de la ĉina popolo.

Speciala Zorgo pri la Naciaj Minoritatoj

Nia elekta sistemo montras ke nia lando estas egalrajta, amika kaj kunlabora familio de ĉiuj nacioj de Ĉinio. Nia *Elekta Leĝo* speciale zorgas pri la enlandaj minoritatoj difinante ke ĉiuj minoritatoj tra la lando kies membraro nombras ĉirkaŭ dekkvaronon de la tutlanda loĝantaro, elektas siajn delegitojn por la Tutlanda Popola Kongreso, laŭ antaŭkalkulo, nombrojn proksimume je sepono de la tuta delegitaro. Ĉar la minoritatoj en la lando estas multaj kaj vaste disloĝantaj, estas necese doni al ili tian bezonatan prizorgon por ke ili havu konvenan nombron da delegitoj por ĉeesti la Tutlandan Popolan Kongreson.

Pro la sama motivo la *Elekta Leĝo* ankaŭ analoge difinas pri la nombro de minoritataj delegitoj en la lokaj popolaj kongresoj ĉiurangaj. Tio klarigas kial la *Elekta Leĝo*, tuj post sia publikiĝo, akiris varman subtenadon de la popolanoj de ĉiuj minoritatoj. Ĝi estas elekta leĝo por la plifirmigo de la granda unuiĝo de la tutlandaj nacioj.

Rajtoj de Elektantoj Estas Garantiitaj

Nia elekta sistemo ne nur konkrete difinas la elektajn rajtojn por la popolo, sed ankaŭ difinas ke ĉiajn elspezojn por la elekto pagas la fisko. Tio estas grava paŝo por materie garantiĝi al la elektantoj kaj kandidatoj la eblecon efektive ĝui la rajton de libera elekto.

Pri la propono de kandidatoj kaj elekto de delegitoj, *La Elekta Leĝo* difinas ke la elektantoj rajtas tute libere elekti tiujn kiujn ili konsideras taŭgaj kaj bezonataj, kaj ili ankaŭ rajtas eksigi sian elektiton laŭ difinita procedo kaj reelekti alian. *La Elekta Leĝo* speciale difinas ke ĉiu, kiu subfosas la elektadon aŭ malhelpas la elektantojn libere uzi sian rajton de elekto kaj elektigo per perforto, minaco, trompo, subaĉeto aŭ alia kontraŭleĝa rimedo, devas esti kriminale punata de popola juĝejo aŭ popola tribunalo.

La suprediritaj difinoj montras ke nia elekta sistemo plene reprezentas la interesojn de la popolo. Nia elekta sistemo estas bona ne nur pro la plene demokrataj principoj kiujn ĝi difinas, sed ankaŭ pro tio ke ĉe ĉiu ĉenero de la tuta elekta laboro ĝi difinas aktualajn, efikajn kaj konkretajn rimedojn por certigi la plenan efektivigon de tiuj principoj.

Aktuala, Praktikebla Sistemo

Fine, ni devas mencii: *La Elekta Leĝo* difinas ke ni faras rektan elekton nur en la fundamentaj unuoj de la ŝtata reĝimo, nome en vilaĝoj, urbetoj, distriktoj de municipaloj kaj municipaloj sendistrikaj, sed en gubernioj kaj aliaj pli superaj unuoj ni faras nerektan elekton. Ni aplikas sekretan balotadon nur en gubernioj kaj aliaj pli superaj unuoj de la ŝtata reĝimo, sed en la fundamentaj unuoj ĝenerale ni aplikas la balotadon per manlevo. T. e. nia elektado ankoraŭ ne estas tute rekta, kaj la balotado ankoraŭ ne estas tute sekreta, pro la aktualaj kondiĉoj ke en la nuna socia cirkonstanco de nia lando al multe da popolanoj mankas elekta sperto kaj restas ankoraŭ sufiĉe multe da analfabetoj. Se ni, sen atento al tiuj aktualaj kondiĉoj, arbitre difinus en la nuna tempo forme kvazaŭ perfektan sed fakte ne efektivegeblan elekton rimedon, rezultigus nenio bona sed nur malfaciloj por la elekto kaj efektiva limigo de elekta rajto al multe da civitanoj.

Kontraste kun Kapitalistaj Landoj

La elekta sistemo kiun nia lando adoptas kaj baldaŭ praktikos ekde majo ĉijare, estas nekomparebla kun la elekta sistemo de iu ajn kapitalista lando. Ni prenu Usonon kiel ekzemplon. Laŭ la Usona oficiala statistiko, en Usono ekzistas pli ol 50 limigoj por la kvalifoj de elektantoj (ekz. la kvanto de havaĵo, daŭro de loĝado, edukiteco, alta aĝo, religia kredo, "socia renomo", ktp.). La "elekta imposto" kaj "kapa imposto" de Usono konstante deprenas la elekton rajton de vasta malriĉa laboranta popolo kaj vasta negraro. Koncerne la rajton de elektigo, oni povas des pli klare vidi ke ĝi estas tute monopoligata de malgranda nombro da milionuloj.

Kiel la balotado en Usono, tiel same estas esence ankaŭ tio en aliaj kapitalistaj landoj. En multe da kapitalistaj landoj virinoj kaj militservantoj estas tute aŭ parte tenataj ekster la elektado; multaj ŝtatoj sovaĝe kaj senmotive difinas limigojn de nacieco kaj raso; kaj

la superaj parlamentoj de kelkaj landoj ĝis nun ankoraŭ aplikas nominacian kaj heredan sistemon por parlamentaneco. En kapitalistaj landoj ĝenerale la kandidatoj devas pagi grandan kvanton da imposto kaj peze ŝarĝi sur si la elspezojn por la elektado. Tio tute malegaligas la rajtojn de la riĉuloj kaj malriĉuloj en kandidatigo. Krome, la burĝoj eĉ subaĉetas per mono, faras "politikajn negocojn" kaj aplikas aliajn malhonestajn rimedojn por atingi sian celon de monopola elekto.

El tio vidiĝas, ke la kapitalista elekta sistemo baziĝas sur la gardo de kapitalista ekspluatado kaj nacia subpremo; ĝi neniel permesas al ordinaraĵaj popolanoj ian rajton partopreni la administradon de ŝtataj aferoj.

Kontraŭe al la kapitalistaj landoj, nia lando estas mastrata de la popolo mem al kiu apartenas la ŝtata regpotenco. La popolo havas rajton sendi siajn delegitojn administri la ŝtatajn aferojn kaj la popolo mem rajtas havi diversajn ŝancojn konstante kontroli la laborojn de la ŝtataj institucioj. Tial, ju pli bone ni funkciigas demokration, des pli fortikiĝas la popoldemokratia diktatoreco, kaj la popola registaro rilatiĝas des pli intime kun la popolo kaj des pli povos, sur la bazo de plena disvolvo de la popola aktiveco, plenumi ĉiun konkretan taskon, precipe la ambaŭ grandajn taskojn antaŭ ni nuntempe—la batalado por paca solvo de la korea milito kaj la grandskala ekonomia konstruado de mia lando.

Kurantaj Aferoj

Ĉeĥoslovaka Film-Festo

"Ĉeĥoslovaka Film-Semajno" okazis en 20 ĉefaj urboj tra la tuta Ĉinio de la 15a ĝis la 24a, apr.

La festo estis patronita de la Ministerio de Kulturaj Aferoj de Ĉinio por pliigi la amikecon kaj kulturen interŝanĝon inter la ĉina kaj ĉeĥoslovaka popoloj.

La filmoj prezentitaj estis: "Ŝtala Urbo", "Silenta Barikado", "Kapka", "La Digo", "Novaj Batalantoj Leviĝos", "Gaja Konkurso", "Vojo al Feliĉo" kaj "Triumfa Marŝo".

La filmo-semajno okazis en Pekino, Tienzino, Taj-ĵuan, Mukdeno, Harbino, Port-Arturo kaj Dajreno, Ĉangĉun, Anŝan, Ŝanhajo, Nankino, Hangĉoŭ, Cingtaŭ, Vuhan, Ĉangŝa, Kantono, Nanning, Ĉungking, Ĉengtu, Sian kaj Lanĉoŭ.

Britio Dankas Ĉinan Popolon pro Akvokatastrofo-Helpo

La Popola Sav-Administracio de Ĉinio ricevis telegramon de la Lordo Urbestro de Londono, Sir Rupert de la Bere, esprimantan dankon al la ĉina popolo pro la donacoj por helpi la britajn viktimojn en la superakvego. Ĝi legiĝas:

"Reprezentante la suferintojn en la superakvego mi dankas la ĉinan popolon pro ilia tre praktika simpatio. Mi jam hodiaŭ ricevis pere de la Britia-Ĉinia Amikeca Asocio vian malavaran donacon de 15,185 funtoj sterlingajn kiu estos agnoskita en la *Times* de merkredo, la 8-an de aprilo. Ankoraŭfoje mian dankon al ĉiuj kiuj kontribuis."

La Londona ĵurnalo *Daily Worker* de la 1-a de aprilo skribis ke la donaco estis prezentita al la Lordo Urbestro pere de D-ro Josef Needham, F.R.S., Prezidanto de la Britia-Ĉinia Amikeca Asocio.

Skizo pri Ĉju Juan

Kuo Mo-jo

Ĉju Jun estas fama poeto, pensulo, patrioto kaj ŝtatisto de antikva Ĉinio. La jaro 1953 markos la 2,230an datrevenon de lia morto. La Monda Packonsilo decidis lin memori ĉijare kiel unu el la elstaraj kreintoj de la komuna kultura heredaĵo de la homaro. En honoro de la okazo, ni aperigas skizon pri Ĉju Juan de Kuo Mo-jo, —Red.

I

Ĉju Juan estas granda ĉina poeto kiu vivis antaŭ pli ol du mil jaroj. Li estis ne nur poeto sed ankaŭ pensulo kaj ŝtatisto.

Li naskiĝis en 340 a. K. dum la periodo de la Militantaj Regnoj (403 a. K.—221 a. K.). La dek du grandaj regnoj de la Princlanda-aŭtuna Periodo (770 a. K.—403 a. K.) estis nun malpliigitaj ĝis sep, kiuj luktis inter si mem por mastri Ĉinion.

El la sep regnoj, Ĉin en la nordokcidento estis la plej potenca, dum Ĉu en la valo de Jangze-rivero estis la plej granda. La regno Ĉi en Ŝantung-duoninsulo, pro sia proksimeco al la maro, havis abundon da fiŝoj kaj salo kaj estis la plej riĉa. Han, Ĉaŭ kaj Vej, kiuj estiĝis rezulte de la partigo de Kin, estis kelkfoje nomataj "Tri Kin-regnoj" kaj okupis la centran parton de la valo de la Flava Rivero. Ili estis malgrandaj landoj dense loĝitaj kaj estis en la koro de antikva Ĉinio. La regno Jen en la nord-oriento borderis Liaŭtung-duoninsulon kaj nordan Koreion kaj tial estis relative for de tiu lukto.

Ĉju Juan estis nobelo de Ĉu. Li naskiĝis kiam la iam potenca regno Ĉu estis malprosperiganta. Lia malsukceso en akiro de la subteno fare de la koruptaj reĝo de Ĉu kaj la aliaj nobeloj al liaj honestaj kaj progresemaj proponoj faris lian vivon tragika.

En la komenco li ĝuis la konfidon de la reĝo de Ĉu, kaj plenumis la altrangan oficon de "maldekstra ministro", estante en konstanta kontakto kun la reĝo kaj helpante la verkadon de leĝoj kaj la decidon pri diplomacia politiko. Pro la danĝero minacanta la

regon Ĉu kaŭzita de Ĉin, Ĉju Juan proponis reformojn en la registaro kaj aliancon kun la regno Ĉi por la sekuro de la ŝtato. Sed la reĝo de Ĉu estis ĉirkaŭata de egoistoj kiel la konsilanto Ze Ĉiaŭ (kiu tenis la plej altrangan oficon en la Ĉu-registaro), la kavaliro Ĉin Ŝang (politika kontraŭulo de Ĉju Juan) kaj la favorato de la reĝo, Reĝino Ĉeng Ŝiu. Subaĉetite de Ĉang Ji,

sendito de Ĉin, ili ne nur detenis Reĝon Huaĵ akcepti la konsilon de Ĉju Juan, sed malintimigis tiun ĉi de la reĝo. Rezulte de tio Reĝo Huaĵ mem estis trompe irigita al Ĉin, kie li mortis post tri-jara kaptiteco.

La sekvanto de Reĝo Huaĵ, Reĝo Ĉing Ŝiang, estis eĉ pli malkompetenta ol lia patro. En la dudek-unua jaro de lia regado (278 a. K.) Generalo Paj Ĉi de Ĉin kondukis sian armeon suden por ataki la ĉefurbon de Ĉu. La regno Ĉu neniam reprosperiĝis. Kvindek kvin jarojn poste ĝi finfine pereis.

La plejparto de la poemoj de Ĉju Juan estis verkita post la malakceptigo de lia politiko. Kiam Paj Ĉi pri-rabis la ĉefurbon, li verkis poemon de lamento. Tiam li estis sesdekdu-jara. Li jam pasigis pli ol dudek jarojn post lia ekŝigo de politika vivo kaj nun, ne povante vidi ian estontecon por sia lando, je la kvina de la kvina monato li dronigis sin mem en Milo-rivero.

II

La vivo de Ĉju Juan estis tragedio. Kiel politika figuro li tute malsukcesis sed kiel poeto li akiris grandan sukceson. La popolo simpatiis kun li. Ne nur la popolo de Ĉu sed ankaŭ la popolo de tuta Ĉinio dum pli ol du mil jaroj estas simpatiinta kun li. Ĉiujare je la kvina de la kvina monato lunkalendara, la tago



Portreto de Ĉju Juan

kiam li mortis laŭ onidiro, la popolo tra Ĉinio okazigas drakboatan konkurson memore al li. Tiu ceremonio sendube reprezentas kiel la popolo de Ĉu tiutempe serĉis lian korpon. En tiu tago la ĉinoj ĉie manĝas specialan specon de pastbulo farita el glueca rizo volvita per folioj kaj bolkuirita. Kaj, laŭ tradicio parto de tiuj pastbuloj estas ĵetataj en la riveron por nutri la drakojn kaj serpentojn, ke ili ne manĝu la korpon de Ĉju Juan. Tiu tradicio jam disvastiĝis al Koreio, Japanio, Vietnamo kaj Malajo.

Ĉju Juan altiris tiel grandan simpatian plejparte pro sia profunda amo al la popolo. Kvankam li estis nobelo de Ĉu, li simpatiis profunde kun la popolo. Antaŭ pli ol du mil jaroj li skribis:

Mi longe malĝojis kun larmo kaj ĝemo
Pro mia popol' en mizera ekstremo.

(La Lamento)

Kaj denove:

Forlasi hejmlandon—la pens' min ektentis,
Sed vid' de l' popola sufer' ĝin forsendis.

La popolo ĉagreniĝas pro tiu kiu ĉagreniĝas pro ĝi. La poemoj de Ĉju Juan elmontras grandan sincerecon. Lia vivo pruvis ke liaj agoj estas konsekvencaj kun liaj vortoj. Li restis forpelita el la kortego por pli ol dudek jaroj, dum kiuj li kondukis privatan vivon sed li neniam foriris el sia patrio. Lia amo al la patrio kaj la popolo estis tiel granda ke li portis malfeliĉojn kaj finfine dronigis sin sed ne volis foriri el la lando Ĉu. Estas facile vidi ke tia homo kiel li nepre estis multe amata de la popolo.

Lia pasio por lia popolo klare vidiĝas en la formo de liaj poemoj. Estas dudek kvin poemoj atribuitaj al Ĉju Juan, el kiuj la plejparton ni povas konsideri kiel aŭtentikan. Kelkaj el tiuj poemoj estas odoj dediĉitaj al la dioj. Li verkis ilin dum sia juneco kiam ĉio bone iris ĉe li. Ili estas freŝaj, sonoraj, kaj ĉarmaj, kiel la milda brizo de printempo. Sed la plej grandan parton de liaj poemoj li skribis post sia ekŝiĝo. Tiuj estas plenaj de indigno, patoso, pasio kaj ĉagreno, kiel la mallumo kiu antaŭiras ŝtormon aŭ kiel la ŝtormo mem.

Liaj poeziaj formoj devenis ĉefe el popolpoezio kaj la vortoj de li uzitaj estis tiuj de la popolo. Li iniciatis revolucion en antikva ĉina poezio kaj lia influo sin sentigis al ĉina literaturo por la lastaj du mil jaroj. La popolo amas liajn poemojn. Kvankam li vivis antaŭ du mil jaroj kaj lia lingvo diferencas konsiderinde de tiu de la nuna tempo tamen ili ankoraŭ forte kortuŝas nin kiam ili estas tradukitaj en modernan ĉinan aŭ fremdan lingvon.

III

La poezia imagpovo de Ĉju Juan estas senrivala en ĉina literaturo. El lia *Li Saŭ (La Lamento)*, la plej granda el liaj poemoj, ni povas vidi ke li sentis ke ĉio en naturo posedas vivon kaj ke ili povas disponiĝi en servo al li. Vento, pluvo, tondro, fulmo, nubo kaj luno fariĝas liaj servistoj kaj ĉargvidistoj. Fenikso kaj

drako tiras lian ĉaron. Li galopas al la ĉielo kaj atingas la ĉielan pordegon kaj poste li grimpas sur la tegmenton de la mondo kaj vagas ĝis la ekstremaj partoj de la tero. Sed li ne trovis trankvilon ĉie ajn kaj finfine venis al sinmortigo.

Kvankam li ŝatis lasi plenan liberon al sia imago iluzii pri paradizo kaj infero aŭ diversaj spiritoj, li ne adoris ilin. La paradizo kaj la infero egale ŝajnis al li lokoj kie la spirito ne povis restadi. En lia poemo *Rekvieto* li admonas la animon ne iri al la paradizo aŭ la infero, nek al la nordo, sudo, oriento aŭ okcidento, ĉar nenio bona estis trovebla tie. Lia hejmlando estis la plej bona. En *Li Saŭ (La Lamento)* li priskribas kiel li atingis la pordon de la paradizo kaj vokis la pordgardiston malfermi ĝin, sed la pordgardisto nur sin apogis sur la pordo rigardante lin—eble ne dezirante lin enlasi. Sekve li fine ĝemis kaj diris: "Ĝe en paradizo ne estas bonulo."

La plej rimarkinda estas lia longa poemo titolita "*Tien Ven.*" En tiu poemo li prezentas demandojn pri kio ekzistis antaŭ ol la universo, la kreado de la ĉielaj korpoj kaj la strukturo de la tero. Li ankaŭ demandas pri mitoj, legendoj kaj historiaj okazaĵoj. Pli ol cent sepdek demandoj estas faritaj kaj neniuj el ili estas respondita. Tiuj enigmoj donas al ni kelkan ideon pri la mitoj de antikva Ĉinio, sed multaj el ili estas nun nekompreneblaj pro la perdiĝo de multego da antikvaj legendoj.


Laŭ mia opinio, tiuj kiuj plej meritas atenton estas la demandoj pri la kreado de la ĉielaj korpoj. Kiu konstruis la ĉielon? Kie ĝi finiĝas? Kio subtenas la ĉielon? Kial oni ĝin dividis en dek du zodiakajn signojn? Kiel la suno, luno kaj steloj fiksiĝas en siaj pozicioj ke ili ne falas? Kiom da kilometroj la suno iras en unu tago? Kio iĝas la lunon kreski kaj mal-kreski? Kie la suno sin kaŝas antaŭ tagiĝo? Tiuj estas la enigmoj prezentitaj de la poeto kaj ili estas demandoj tre raciaj kaj el ili ni povas vidi lian intereson pri naturo, kaj la riĉecon de lia imago.

Fakte ĉina scienco en la epoko de Ĉju Juan atingis altan nivelon. En astronomio, kalendara scienco kaj matematiko montriĝis granda progreso dum logiko bone disvolviĝis. Unu suda filozofo nomita Huang Liaŭ, kiu vivis ne tre longe antaŭ Ĉju Juan, foje demandis nordan klerulon, Huej Ŝe, kiu estis bone konata logikisto, kial la ĉielaj korpoj ne falas kaj kio kaŝas la venton, pluvon, tondron kaj fulmon. Kaj Huej Ŝe donis al li respondojn. Tio montras ke la intelektuloj de tiu epoko ĝenerale interesiĝis pri problemoj koncerne la formiĝon de la universo.

Ĉju Juan vivis en la ora epoko de antikva ĉina civilizacio. Liaj genio kaj pozicio faciligis al li la asimiladon de penso de diversaj skoloj kaj multflankan disvolviĝon. Sed plej supera estis lia genio en poezio. Efektive, malmultaj poetoj en la mondo povas lin rivali rilate al liaj sincereco, imagpovo kaj brileco aŭ liaj riĉa figurado, lirika kvalito kaj diverseco de poem-formoj.

Tiu ĉi poeto, kiu tiel amis sian patruon kaj sian popolon, kiu amis liberecon kaj justecon, neniam mortis.

La Sanatorio bele
situas sur Tuŝan-
monteto en Taj-
lago.



Modelaj laborist-
inoj el diversaj
entreprenoj ĝuas
ĉi tie ripozadon.



La Orientĉinia Laborista Sanatorio ĉe Taj-lago

La liberigo de Ĉinio alportis al la ĉina laboristaro ne nur sufi-
da pano kaj vestoj, komfortajn loĝejojn kaj riĉan kulturen vivon,
sed ankaŭ multajn ripozhejmojn kaj sanatoriojn en la plej bel-
lokoj tra tuta Ĉinio. La Orientĉinia Laborista Sanatorio, fondi-
ta en la vintro de 1952, estas nur unu el ili.




Ŝakludo, unu el la ŝatataj distraĵoj en la sanatorio.




En la legoĉambro de la sanatorio.

ANTAŬEN A

Kelkaj Scenoj el
Konstr





eputoj en la ole-abunda Nordokcidento de Ĉinio. La ekstraktita kruda oleo en 1953 pliĝos je 42 procentoj ol tiu en 1952.



j novaj industriaj fabrikoj estas ekipataj per
lej modernaj maŝinoj. Giganta drilo laboranta
ĉe la Ŝanhaja Elektromaŝina Fabriko.


Ĉinaj ŝipkon-
struistoj estas fer-
voraj partopren-
antoj de la pli-
produkta movado
kaj ili produktas
ĉiam pli bonkva-
litajn ŝipojn.




Pontokonstruado sur la
Tienŝuj-Lanĉou-a Fervojo,
kiu estas nun etendiganta
al Sinkiang-provinco. La
600-kilometroj da fervojo
kompletigendaj en 1953
faras grandan postulon al
la kreskanta peza industrio
de Ĉinio

L INDUSTRIIGO!

la Grandskala Ekonomia
budo de Ĉinio




Dank' al la fervora helpado de Sovetiaj specialistoj, jen konstruiĝis giganta kaj plej moderna elektrejo en nova Ĉinio. Sovetia specialistino lernigas al ĉina laboristo manipuli la kontrolilojn.



La Blovfornego N-ro 8 de la Fera-Ŝtala Kompanio Anŝan jam estas sukcese en aŭtomatan blovfornegon. granda kvanto da varma vento de ĝi bezonata estas provizata de tiu ĉi giganta varm-venta fornego aŭtomatigi

Nova teksejo en Vuhan ekipita per modernaj maŝinoj
Produkto de teksaĵo pliigos je 16 procentoj ĉijare

Ĉinaj industrioj jam provizas ekipaĵojn por grandaj projektoj kia tiu ĉi kluzdigo sur Huaĵ-rivero.



Granda parado
malfermis la
konkursojn.



Olimpio de Militkaptitoj


La vivo en la militkaptitejoj en Norda Koreio akre kontrastas al la kruela traktado al la ĉinaj kaj koreaj militkaptitoj en la Usonaj mortigejoj.

Sub la aŭspicio de la ĉinaj kaj koreaj popolaj fortoj, militkaptitoj de multaj nacioj el la invadaj fortoj en Koreio okazigis sportkunvenon inter militkaptitejoj, de la 15a ĝis la 26a de novembro, lastjare.

Premiaj standardoj por la ĉampionoj de futbalo kaj kurado tenataj de Bruce (Militkaptitejo N-ro 1) kaj Bieber (Militkaptitejo N-ro 5).

amikoj ĉe la kunveno. De maldekstre: Dayton W. Ad, Jack H. Ridlington, Walter L. Jackson Jr., Louis L. Adkins.

pilka konkurso inter la Militkaptitejoj N-ro 1 kaj N-ro 2.



Labor-protekto en Nova Ĉinio

Kiang Taŭ

Vicestro de la Departemento de Labor-protekto kaj Labor-asekuro de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj

Pasinte, inter la imperiistoj populariĝis la jena diro: "Tempo kaj vivo estas la plej malkaraj en Ĉinio." Kaj tial ili, en la lando kie la tempo kaj vivo estas la plej malkaraj, konspiris kune kun la ĉinaj feŭdisma potenco kaj burokrata burĝaro kontraŭ la laboranta popolo de Ĉinio por efektiviĝi sian kruelan ekspluatadon. Tia ekspluatado, laŭ sia karaktero, estis kapitalisma kaj antaŭkapitalisma (feŭdisma, kaj kelkie eĉ sklaveca), kaj sekve la plej barbara.

Tiam, la laboranta popolo, por gajni kaj teni la duonsatan vivadon, devis fari pezan laboron sub nekredeble aĉaj kondiĉoj, ne havante la minimuman sekurecon pri sano kaj vivo. En fabrikoj kaj minejoj ekzistas nenia arango por sekureco kaj higieno, kaj vundoj kaj mortoj fariĝis ĉiutagaĵo. Ekz. gas-eksplodo, kiu okazis iufoje en la karbominejo de Hokang (en la Nordoriento) dum la regado de la japanaj imperiistoj, pereigis 1200 ministojn per unu fojo. La dirita minejo havis, krom siaj ŝaktoj, specialan fosajon "kadavrarejo" por enjeti la mortintajn laboristojn.

La situacio de virinaj kaj geknabaj laboristoj estis ankoraŭ multe pli mizera. Oni vidis en ili pli malkaran objekton por pli kruela ekspluatado. Ni prenu kiel ekzemplon la stano-minejon en Koku, Junnan-provinco. La administrantoj de tiu minejo, pro ĉasado de alta profito, sklavigis grandan nombron da geknabaj laboristoj 12-13-jaraj, devigante ilin laboradi en malaltaj galerioj kie estis nenia instalaĵo por ventolado aŭ lumigado. Por malebligi al tiuj geknabaj forkuri, la minoposedantoj ofte ilin katenigis per feraj ĉenoj. Al tiuj, kiuj intencis forkuri sed estis kaptitaj, la minoposedantoj blindigis la okulojn, tiel ke ili dum la tuta vivo neniam eskapu el la sklaveca laboro. Tial la mortopocento estis terure alta. Laŭtakse, la produkto de ĉiu dekmil tunoj da stano kostis la vivon de kelkcent ĝis mil geknabaj.

En teksta industrio, la geknabaj laboristoj kaj la gravedaj laboristinoj devis, same kiel la ordinara laboruloj, laboradi starante kaj streĉe por 12 horoj ĉiutage en kotonŝpinoj kiu havis nenian sekurigon. Sekve ankaŭ la pocentoj de vundiĝo kaj malsaniĝo estis tre altaj, kaj abortoj kaj abortigaj estis oftaj.

Tiu ĉi mizera situacio de la ĉina laboranta popolo radikale ŝanĝiĝis sekve de la venko de la revolucio. La laborista klaso, elirinte el la pasinta stato de bruta sklaveco, jam fariĝis la mastroj de sia ŝtato kaj sia propra sorto. Jam en la tago, kiam fondiĝis la Popola Respubliko de Ĉinio, la politiko kaj principo pri laborprotekto estis klare difinitaj en la fundamenta leĝo de nia ŝtato—la Komuna Programo. Nur de tiam, la laboranta popolo, kiu kreas civilizacion kaj sociajn riĉaĵojn, ĝuas respekton kaj varman amon. Tempo kaj vivo de la laboranta popolo, kiuj pasinte estis konsiderataj tiel senvaloraj, jam fariĝis la plej altvalora trezoro.

Nun la laboruloj konscias, ke ili laboras ne por iu alia, sed por si mem kaj sia ŝtato. Tial, ili varme kaj arde sin okupas je grandaj produktaj konkursoj, kal-

kulante sian laboron je minuto, je sekundo. Tamen samtempe Prezidanto Maŭ Ze-tung speciale instrukas: "Dum pliproduktado kaj ŝparado, oni devas ankaŭ prizorgi la sekurecon kaj sanon de la laboristoj kaj aliajn necesajn aranĝojn por ilia bonstato; estus erare, se oni nur emfazus la unuan flankon forgesante aŭ neglektante la lastan." Tia prizorgemo al la laboranta popolo jam fariĝis la esenca gvida principo en la tuta produkta organizo de Ĉinio. La kapitalisma pensmaniero konsideri maŝinaron pli valora ol homo, kaj la unuflanka vidpunkto prizorgi nur pri produkto neglektante la sekurecon de laboristoj, jam estas kritikitaj kaj iom post iom forviŝitaj. Estimo kaj protekto al laboro estas definitive starigita kiel unu el la novaj moral-kriterioj en Popola Ĉinio.

Nun entute 129 diversaj leĝoj kaj regularoj koncerne protekton, sekurecon kaj higienon de laboro estis faritaj kaj proklamitaj de la Centra Popola Registaro. En ĉiurangaj popolaj registaroj specialaj institucioj establiĝis por zorgi kaj kontroli, ke tiuj leĝoj estu bone efektivitaj. En la administraj fakoj de fabrikoj kaj minejoj entreprenoj—de la supraj ĝis la malsupraj—universale fondiĝis specialaj organizoj de sekuriga tekniko kaj laborprotekto, prenante sur sin la respondecon plibonigi sekurec- kaj higien-aranĝojn en la fabrikoj kaj minejoj entreprenoj kaj edukante la laboristojn pri sekuriga tekniko. Pli grava estas tio, ke la ŝtato donis al la sindikatoj plenan rajton, ke ĝi, kune kun la reprezentantoj de la laboristoj, zorgu kaj kontrolu la efektivigon de ĉiaj leĝoj pri laborprotekto kaj sekuriga tekniko.

Kaj krome la registaro ordonis la fabrikojn kaj minejojn entreprenojn tra la tuta lando fari ĝeneralan kontrolon pri sekureco kaj higieno. Kontrolaj organizoj estu starigitaj de la diversaj entreprenoj kune kun la komitatoj por laborprotekto de la respektivaj sindikatoj, por mobilizi la laboristojn fari detalan kontrolon pri siaj maŝinaro, instrumentoj kaj la labor-cirkonstancoj, por trovi mankojn de labor-sekureco kaj poste diskuti kaj studi rimedon por ilin forigi. Granda sumo da mono estis asignita de la registaro kaj la entreprenoj por plibonigi la sekurec- kaj higien-aranĝojn en la fabrikoj kaj minejoj entreprenoj. Tiu-cela elspezo nur por la fervoja sistemo jam atingis 100,000 milionojn da juanoj dum la pasintaj tri jaroj.

La laboristoj montris altan respondemon kaj aktivecon ankaŭ en la reformado de labor-kondiĉoj. Ekz. el la 210,000 pli-malpli gravaj problemoj, kiujn oni trovis dum la kontrolado en la fabrikoj kaj minejoj entreprenoj de Nordorienta Ĉinio, 70 pocentoj kiuj havas ĝeneralan karakteron estis solvitaj de la laboristoj mem.

Por sproni sekuran produktadon, la Popola Registaro donas administran aŭ kriminalan punon al tiuj administrantoj, kiuj kaŭzis akcidentojn al laboristoj pro sia nelekto en plibonigo de labor-kondiĉoj; dum al tiuj, kiuj vikle plibonigis labor-kondiĉojn kaj tute malokazigis gravajn akcidentojn en siaj entreprenoj, la

registaro donas honoran aŭ materialan premion. En 1952, la Karbominejo de Kiaŭzo, Honan-provinco, akiris la gloran titolon de Modelo de Sekura Produktado pro tio, ke ĝi kreis la rekordon, ke dum la tuta jaro mortis neniu laboristo, kaj krome, ke en ĝi nove konstruiĝis loĝejoj, manĝejoj, banejoj, maljunulejo, sanatorio kaj infanvartejo. Kiel premion al la diversaj laborejoj, laborgrupoj aŭ individuoj en la kemia industrio, kiuj sufiĉe atentis sekuran produktadon kaj tiel atingis bonan rezultaton, la registaro entute elspezis 300,000,000 juanojn.

Nun disvolviĝis landskala movado por sekura produktado. Tiu ĉi kampanjo estis iniciatita de Ŝe Ju-haj, karboministro de Sian-minejo en la Nordoriento, kune kun la de li gvidata laborgrupo. Tiu ĉi laborgrupo kreis rekordon de "senakcidenteco dum kvin jaroj", kaj, alvokante kaj defiante, entiris pli ol 2,000 laborgrupojn en la grandan konkurson por sekura produktado. Nun inter tiuj ĉi konkurantaj laborgrupoj jam troviĝas 450 laborgrupoj kiuj tute forigis akcidenton de morto aŭ grava vundiĝo dum tuta jaro. Tiu ĉi grandskala konkurso treege malmultigis akcidentojn, kaj tial Ŝe Ju-haj akiris al si la gloran titolon de Standardo de Sekura Produktado.

Nun en ĉiuj ŝtataj minejoj kaj industrioj estas universale praktikata la 8-laborhora sistemo, kun unu libertago en ĉiu semajno. Kaj en iuj fakoj, kie la kondiĉoj malfavoras al sano, malpli longa labortempo estis difinita. Ekz. en iuj sano-difektaj sekcioj en la kemi-industrio oni praktikas la 6-horan sistemon.


Pri speciala protekto al laboristinoj kaj nematuraj laboristoj, la Popola Registaro donis grandegan atenton. Ĉirkaŭ sia akuŝo, laboristino ricevas 56-tagan forpermeson kun salajro. En multaj industrioj tiaj prizorgoj al gravedaj laboristinoj kiel antaŭ-akuŝa ekzameno, malpliintensigo de laboro aŭ transigo al pli facila posteno estas praktikataj. La kapacito de infanvartejoj en la tuta lando estas nun okoble pli granda

ol antaŭ liberigo, ebligante la laboristinojn sin liberigi de infan-malhelpo, kiu jam delonge ilin suferigis. En kemi-industrio, la san-difekta laboro, nokta deĵoro kaj ekstradejara tasko (kun aldona salajro) estas malpermesataj al gravedaj laboristinoj, mamnutrantaj patrinoj aŭ sub-18-jaraj geknaboj.

La malfavoraj labor-kondiĉoj, postrestantaj el la historio, nun multege ŝanĝiĝis. Ekz. en karbominejoj, oni plibonigis la ventolan sistemon por malokazigi gas-eksplozojn. Nun la ministoj en la ŝaktoj laboras sub favoraj kondiĉoj de freŝa aero kaj konvena temperaturo, kaj tial tre malofte okazas vundiĝo aŭ morto. En la fera-ŝtala industrio kaj kemi-industrio, sin montris unu post la alia tiaj novaj ekipaĵoj kiaj kontraŭ-varmradia ekrano, akva kurteno, aera duŝo kaj kontraŭpulvora kaj kontraŭ-gasa hermetigilo por radikale plibonigi labor-kondiĉojn por la laboristoj.

Rezulte de ĉiuj tiuj penadoj, la vund- kaj mort-pcentoj malaltiĝis, la sano kaj vivo de la laboristoj garantiĝis, la politika konscio kaj produkta entuziasmo de la laboristoj senprecedence altiĝis kaj la produktiveco senĉese pliiĝis. La produktiveco de karboministoj plialtiĝis je 88 pcentoj ol antaŭ liberigo. Tiu en la kemi-industrio en 1952 plialtiĝis je 76.7 pcentoj kompare kun tiu en 1950. La riĉaĵoj de la ŝtato multiĝis, kaj paralele, la vivnivelo de la laboristoj altiĝis. Tio ĉi pravas, ke inter produkt-disvolvo kaj laborprotekto ne ekzistas kontraŭdiro, sed male, ili stimulas unu la alian.

Por bonvenigi la unuan kvinjarplanon por ekonomikonstruado de nia lando, la Ministrejo de Laboro de la Centra Popola Registaro kunvokis la Duan Tutlandan Konferencon por Laborprotekto en decembro, 1952, en kiu oni resumis la spertojn akiritajn dum la pasintaj tri jaroj kaj starigis al si la principon kaj taskon plintensigi la klopodon de laborprotekto estonte, tiel kreante favorajn kondiĉojn por sukcesa entreprenado de la grandskala ekonomia konstruado.



La ventola sistemo de Kiaŭzo-karbominejo garantias al la ministoj provizon de sufiĉe da freŝa aero.

Kurantaj Aferoj

Komenciĝis Konstruado de la Lanĉou-Sinkiang-a Fervojo

Grandskala konstruado sur la projektita Lanĉou-Sinkiang-a Fervojo, la arterio kiu interligos la vastan regionon de Nordokcidenta Ĉinio kun la ceteraj partoj de la lando, estas komencita. Dekoj da miloj da konstruistoj jam venis al la destinita laborejo kovranta pli ol cent kilometrojn okcidente de Lanĉou. Ĉijare finkonstruiĝos 184-kilometra sekcio de tiu ĉi fervojo. Rel-meta laboro de la 36-kilometra sekcio de Lanĉou ĝis la nova Flavrivera Ponto jam kompletigis.

Por celebri la Majtagon, 11,000 konstruistoj garantiis kompletigi ekstran rel-metan laboron de aliaj 33 kilometroj antaŭ la 10a de majo.

Hindia Elefanto Alvenis

Elefanto 14-jara, donacita al Ĉinio de Ĉefministro Pandit Jawaharlal Nehru en la nomo de la Hindia Registaro, jam alvenis al Kantono. La elefanto nomiĝas Asa, pezas proksimume unu kaj duonan tunojn. Oni ĝin sendos al Pekino kiam la vetero fariĝas pli varma.

Ĉinio Konstruas Ses Modernajn Teksejojn

C. L. Feng

Ĉinio konstruis dum iom pli ol unu jaro ses modernajn teksejojn, kiuj nun plene funkcias. Tiu ĉi granda projekto estas parto de la plano por kontentigo de la multe pligrandiĝinta bezono de la ĉina popolo por koton-tekstoj. La fabrikoj lokiĝas en ses malsamaj urboj: Harbin, Vuhan, Tihua, Ĉengĉou, Sian kaj Hantan (en Hopej-provinco). Kvar el ili estas tute ekipitaj per maŝinoj fabrikitaj en Ĉinio.


La ses nove konstruitaj fabrikoj estas markitaj per tri komunaj karakterizoj. Ili estas tute ekipitaj per modernaj meĥanikaj instalaĵoj kiuj posedas altan produkt-povon. En la Harbina Lin-teksejo, ekz., kvar ĉefaj laborejoj de la fabriko estas ekipitaj per la plej modernaj Sovetiaj aŭtomataj maŝinoj. La gigantaj blankiga laborejo kaj satur-laborejo estas sub kontrolo de puŝ-butona instalaĵo. La jara produkto de lintolo de tiu ĉi fabriko estas sufiĉa por fari pli ol 2,500,000 kompletojn da vestoj. La Sian-a Teksejo N-ro 1 produktas ĉiujare sufiĉan materialon por fari 7,000,000 kompletojn da vestoj.

Ĉiuj ĉi fabrikoj provizas bonajn laborkondiĉojn. La laborejoj estas konstruitaj el betono kaj ŝtalo. Ventoliloj, aspergiloj kaj varmigiloj estas instalitaj en ĉiuj ĉefaj laborejoj por reguligi la humidecon kaj temperaturon. Laboristoj en la laborejoj kaj laborantoj en la oficejoj, ĉu en fraŭleco aŭ ne, havas siajn loĝejojn kun ĝardenoj, klinikoj kaj lernejoj por infanoj.

Pro tio, ke la fabrikoj estas starigitaj en koton-produktaj cen-

troj, ili facile akiras krudajn materialojn kaj estas proksimaj al la kamparaj merkatoj kiuj havas grandegan postulon de koton-produktaĵoj. Ekz., la Ĉengĉoua Teksejo sin lokas en Ĉengĉou kiu estas la koton-produkta centro de Honan-provinco kaj estas sufiĉe proksima al la kruda kotono grandkvante produktata en okcidenta kaj orienta Honan.

Pasinttempe, la teks-maŝina industrio de Ĉinio estis nedisvolva kaj povis nur fari riparon kaj produkti akcesorajojn de maŝinoj. Post la liberigo, la industrio komencis antaŭeniri per grandaj paŝoj. En 1951, la fabrikoj de nova Ĉinio jam produktis tutajn kompletojn da teks- kaj ŝpin-maŝinoj. La finkonstruado de la ses modernaj teksejoj turnas novan paĝon en la teks-industrio de Ĉinio.



Soldatinoj de la Popola Liberiga Armeo laboras en la Teksejo Julio-unua ĉe Tihua, Sinkiang-provinco.

Kurantaj Aferoj

Bona Fiŝkapto

Bona fiŝkapto estas raportita el la marbordo de Ĉekiang-provinco kie estas nun en plej fiŝabunda sezono. Mil fiŝkaptaj ŝipoj estas ĉasantaj la arojn de malgrandaj kvakfiŝoj.

En la Tinghaj-a fiŝkaptejo sola, 5,000 tunoj da malgrandaj kvakfiŝoj estas kaptitaj. La tuta kaptaĵo de malgrandaj kvakfiŝoj en tiu ĉi regiono espereble atingos pli ol 10,000 tunojn—rekorda cifero de jarprodukto.

Kaptado de grandaj kvakfiŝoj ankaŭ tuj komenĝos. Pli ol 10,000 boatoj, 7 procentojn pli multe ol lastjare, estas pretaj por fiŝĉasado. Ili estas ekipitaj per duoble tiom da retoj kiom ili havis lastjare.

Kvar balenoj estas kaptitaj de ĉinaj balenkaptistoj proksime de la Kuangtung-a marbordo, oriente de Lejĉou-duoninsulo en Suda Ĉinio. El ili estas du baleninoj pezantaj po 20-23 tunojn kaj du balenidoj pezantaj respektive je 2 kaj 3 tunoj.

Tio ĉi estas la unuafaĵa kapto de la unua ekspedicio de du balenkaptaj ŝiparoj kiuj organiziĝis ĉi-printempe per la helpo de la Popola Registaro.

La malprofundejoj proksime de Vajlo sur Lejĉou-duoninsulo estas natura balenkaptejo, kie baleninoj venas ĉiujare en decembro por naski idon. Fiŝkaptistoj tieaj jam delonge okupiĝas pri balenkaptado. Ĉi-printempe du ŝiparoj estis organizitaj de ili helpe de la Popola Registaro, kaj organizita balenkaptado komenĝis.

Rakonto pri Du Fabrikoj

John W. Powell

La verkinto estas usonano kaj redaktoro de *Ĉinia Monata Revuo*, anglalingva ĵurnalo eldonata en Ŝanhajo depost 1918. Lastjare li vizitis plurajn gravajn urbojn de Ĉinio kune kun la Usonaj delegitoj al la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj. La artikolo, aperinta en la januara numero de *Ĉinia Monata Revuo*, priskribas kion li vidis dum la vojaĝo. —la red.

Jen estas rakonto pri du fabrikoj. Unu estas juto-teksejo en la orienta turisma urbo Hangĉoŭ kaj la alia, lan-teksejo en la norda haven-urbo Tienzino. Ili havas multajn similaĵojn, sed en kelkaj flankoj ili estas tute malsamaj. Ili estas similaj en tio ke ambaŭ estas prosperantaj, tagnokte funkciantaj fabrikoj kie viroj kaj virinoj laboras per alta rapideco por liveri la fabrikaĵojn kiujn la ĉiam pligrandiganta ekonomio de Ĉinio bezonas. Ili estas malsamaj en tio ke unu estas tute nova ŝtata fabriko, dum la alia, 30-jarojn malnova kaj privata.

La Kreskado de la Ŝtata Juto-teksejo

Malgraŭ la noveco de siaj konstruaĵoj kaj de multe de siaj maŝinoj, la ŝtata Ĉekianga Juto-teksejo havas historion de kelkaj jaroj. Frue en la jaroj ĉirkaŭ 1935 la malnova Kuomintanga registaro, en unu el siaj pli raciaj momentoj, aĉetis de Britlando sufiĉe multe da teks-maŝinoj por starigi mezgrandan juto-teksejon. Tamen la Kuomintango ŝajnis ne kapabla fari pluan klopodon. La maŝinoj estis indiferente formetitaj ien kaj forgesitaj.

Post kiam Ĉiang kaj lia korupta Kuomintango estis elpelitaj al Tajvan, la nova registaro revivigis planojn por la teksejo. La maŝinoj—multe rustiĝintaj kaj kun ĉirkaŭ 20 procentoj de la maŝinpartoj malaperintaj—estis malkovritaj kaj laboro komenciĝis por ilin remunti kaj por konstrui taŭgajn fabrikdomojn.

La laboro komenciĝis en decembro, 1949. Ĉiaj problemoj elkreskadis. Mankis inĝenieroj spertaj en ĉi tiu kampo, dum ĉiuj laboristoj devis esti dekomence trejnataj. Tamen laboro antaŭen iris kaj la fabriko komencis funkciadon en aŭgusto, 1950, ok monatojn poste.

Dum la laboro, la laboristoj kaj administranta oficistaro multe lernis pri juto-teksado. Sekve kiam oni komencis laboron super la Orienta Laborejo—la dua stadio de la konstrua plano—en decembro, 1950, multaj plibonigoj estis faritaj al la maŝinoj kaj al la fabrik-procedoj.

La nova ekipaĵo fabrikita de ĉinaj maŝinfabrikoj ebligis al la teksejo ne nur transsalti unu tutan procedon, tiel alportante grandan ŝparon en laboro kaj multege mallongigante la tempon bezonatan por produkto, sed ankaŭ produkti ŝpinaĵon 30 procentojn pli fortan ol tiu fabrikita en la unua laborejo. Ĉe la kompletigo de ĉi tiu laborejo en oktobro, 1951, laboro komenciĝis super la tria, kaj, nun, la lasta laborejo.

La Granda Norda Laborejo, kies maŝinoj estas ankaŭ faritaj en Ĉinio, nun alproksimiĝas al kompletigo kaj komencos funkcii en la frua parto de ĉi tiu jaro. Ĉi tiu laborejo distingiĝas ne nur per pli-

bonigita maŝinplano, sed ankaŭ per sia grandeco. Ĝi estas multe pli granda ol la unua kaj dua laborejoj kunigitaj kaj postulos la servon de 7,000 laboristoj, tiel plialtigante la nombron de la laboristoj de la teksejo ĝis 10,000 viroj kaj virinoj.

Bonaj Laborkondiĉoj

Neniu maŝino estas sen sekurigilo. Gigantaj ventoltuboj elsuĉas la polvon kaj juterojn super la diversaj dissplitigaj maŝinoj. Polvo-subigaj aspergiloj estas norma ekipaĵo. La tuta fabriko estas aerumata en somero kaj hejtata per radiatoroj en vintro.

Sed eĉ pli impresaj ol la konstruaĵoj kaj maŝinoj de la fabriko estas la senlupagaj loĝejoj, la sportejoj, publikaj manĝoĉambroj kaj aliaj oportunaj pretigitaj por la laboristoj. La konstruaĵoj etendiĝas sur eksterordinare vasta areo, kun spacoj por razenoj, florbetoj kaj arboj ĉirkaŭ ĉiu konstruaĵo. Dislokita en la tuta tereno estas multaj vastaj liberaj kampoj kiuj ĉstos pejzaĝigitaj kaj kie sportejoj estas jam lokitaj. Escepte de la tipe fabrikoformaj laborejoj kun siaj segildentaj tegmentoj, la vidaĵo de la tuta teksejo similas pli verŝajne tiun de kolegio.

Bonoj por Laboristoj

La zorgo pri la bonstato de la laboristoj ne sin limigas je bonaj laborkondiĉoj kaj ĝeneralaj fizikaj ĉirkaŭaĵoj. Tri riĉaj manĝoj estas provizataj de la fabriko kiu ankaŭ starigis manĝoĉambron de speciale preparitaj manĝaĵoj por nesufiĉe pezaj kaj nesufiĉe nutritaj laboristoj. La manĝaĵoj, laŭ la laboristoj, estas pli bonaj ol ordinaraĵ, kun multe da fiŝoj, viando, ovoj, kokaĵo, legomoj, rizo kaj pano. Laboristoj kiuj deĵoras dumnokte havas ripozeton dum kiu ili ricevas vaporumitan panon kaj sojfaban lakton je la kosto de la kompanio.

La laboristaro ankaŭ havas sian kooperativon kie la prezoj estas de 7 ĝis 30 procentojn pli malaltaj ol en la ordinaraĵ vendejoj en la urbo kaj sian barbiĉej-kosmetikejon kie la prezoj estas nur ĉirkaŭ du trionoj de la kuranta prezo en Hangĉoŭ. La Popola Banko, la poŝtoŝtanco, kaj la Libro-vendejo Ŝinhua starigis filiojn en la fabriko.

Laboristinoj ricevas 56-tagan forpermeson kun labor-pago pro akuŝo. Kiam ili revenas al laboro, iliaj beboj estas prizorgataj, se ili tion deziras, en la senpaga bebozorgejo kaj pliposte en la infanvartejo de la fabriko. Patrinoj estas permesataj foriri unu kaj duonan horojn ĉiutage por mamnutri siajn bebojn sen perdo de laborpago. La fabriko pagas specialan subvencion por helpi la prizorgon pri malfortaj beboj.

La fabriko ankaŭ provizas diversajn oportunajojn por edukaj kaj distraĵaj agadoj. Troviĝas en ĝi ĉefa biblioteko kun 6,250 volumoj kaj aldone du malgrandaj ĉirklantaj bibliotekoj. Organizigis 129 grupoj de ĵurnallegado kaj diskutado pri kurantaj aferoj, kun 2,000 laboristoj kiel membroj, kaj 307 laboristoj nun partoprenas en la kleriga kurso gvidata per la nova Metodo de Rapida Ellerno de Ideografoj, per kiu klerigo povas esti atingita relative rapide. La liber-tempa teknika lernejo de la fabriko havas 1,510 laboristo-lernantojn.

La laboristoj organizis multajn refreŝigajn klubojn kiuj havas korbopilkon, volejbolon, pingpong, badmintonon kaj gimnastikan ekipaĵon. Ili havas dramajn kaj ĥoran grupojn kaj radio-disaŭdigan instaladon. Dancoj estas okazigataj ĉiusemajne.

Sub ĉi tiaj kondiĉoj, la spirito de la laboristoj kompreneble altiĝas. Hodiaŭ la tuta laborefiko estas trioble pli granda ol kiam la unua laborejo malfermiĝis en aŭgusto, 1950. Okcent raciigaj proponoj estis prezentitaj de la laboristoj, rezultigante ŝparon de milionoj da ĵuanoj. La fabriko nun havas 16 modelajn laboristojn, 815 progresintajn laboristojn kaj 12 progresintajn laborgrupojn.

La Renaskiĝo de la Lan-teksejo Ĵenli

La Lan-teksejo Ĵenli en Tienzino estas privata entrepreno establita en 1922. De tiam ĝi havis siajn prosperajn kaj malprosperajn periodojn, sed hodiaŭ ĝi funkcias senhalte en sia plena kapablo kaj gajnas regulan profiton kaj ĝia patrino kompanio jam komencis plivastigi sian entreprenkampon, malfermante du novajn fabrikojn—ovoprilaborejo kaj kanab-teksejo.

Kiel la ĉefadministranto kaj ĉefa akci-havanto, Ĉu Ĉi-sun, klarigis al ni kiam ni vizitis lian fabrikon, tio estas la unua fojo en multaj jaroj ke la administracio povas rigardi en la estontecon kun memfido. Antaŭe, eĉ en relative prosperaj periodoj, la estonteco estis necerta. Kiam la japanaj invadantoj okupis Tienzinon, ili perforte "aĉetis" la produktaĵojn de Ĵenli laŭ diktitaj prezoj kiuj ofte ne povis kovri la produktokostojn. Post la malvenko de Japanio venis la Kuomintang. La inflacio kaj la inundo de Usonaj varoj en la ĉinan merkaton preskaŭ pelis Ĵenlin ĝis la muro.

Kiel multaj aliaj komercistoj kaj industriistoj, la administranto de la kompanio Ĵenli bonvenigis la novan registaron kun miksitaj sentoj. Li estis ĝoja vidante la finiĝon de la Kuomintang, sed samtempe li multe dubis pri kio estis venonta.

Dum esperoj leviĝis preskaŭ tuj post la malvenko de la Kuomintang, la periodo tuj post la liberigo estis tiu de reĝustigo. La fabriko devis renkonti kaj venki multe da malfaciloj. Antaŭ ol Centra Ĉinio kaj Suda Ĉinio estis liberigitaj, la fabriko trovis malfacilaĵojn en akirado de krudmaterialoj kaj en kontaktado kun sia plena merkato. Ĝi sukcesis transpasi ĉi tiun periodon plejparte dank' al la helpo de la registaro en la formo de liverado de krudmaterialoj kaj aĉetado de produktaĵoj.

La Rezulto de la Blokado de Usona Imperiismo

La de Usonoinstigita Kuomintanga blokado kaj la Usona embargo kontraŭ Ĉinio kaŭzis novajn problemojn. Ĵenli estis tranĉita for de parto de siaj merkatoj, precipe en la kazo de sia tapiŝeto-teksejo kiu vivis de eksportado kaj sekve estis devigita ĉesigi funkciadon. La fabriko estis ankaŭ fortranĉita de sia kutima fonto de maŝinoj kaj rezervaj maŝinpartoj.

Tamen, kiel la afero elvolviĝis, el la blokado kaj embargo devenis ankaŭ kelkaj avantaĝoj. Ĝi tuj forigis el la merkato la inundon de Usonaj varoj kiuj kelkfoje preskaŭ sufokis la funkciadon de Ĵenli en la pasinteco. Ĝi ankaŭ kreis postulon por diversaj lanaj industriaj produktaĵoj flanke de tiuj fabrikoj kiuj antaŭe dependis de Usonaj kaj Okcidenteŭropaj provizoj. Por plenumi tiajn mendojn, Ĵenli devis instali novajn maŝinojn, ĉar ĝia malnova ekipaĵo destinita por produkti altkvalitan ŝtofon por vestoj ne povis produkti tiajn varojn bezonatajn de industrio.

Post multe da diskutado inter la administracio kaj la laboristoj, estis decidite provi la laboron ĝuste en la fabriko, adaptante kelkajn maŝinojn, desegnante novajn maŝinojn per si mem kaj igante ilin manfaritaj en tiu haven-urbo. La reĝustiga laboro finfine kompletigis kaj Ĵenli nun produktas senkudroliniajn pezajn feltojn por rulumiloj de papermaŝinoj kaj diversajn aliajn industriajn lanproduktaĵojn. Nuntempe proksimume 70 procentoj de ĝiaj produktaĵoj iras al la industrio.

La Kapitalista-laborista Interrilato en Privata Entrepreno

Post kiam ni trarigardis la fabrikon kaj interparolis kun kelkaj laboristoj, ni havis longan intervjuon kunsidon kun la administranto. Respondante al demando pri iliaj rilatoj kun la laboristoj S-ro Ĉu diris, "Tuj post la liberigo, mi estis maltrankvila. Tiam mi pensis ke la komunistoj venis kaj mi neeviteble renkontos prilaboristajn problemojn. Sed mi baldaŭ rimarkis ke tiaj maltrankviloj estis senbazaj. La gvidanta principo por fabrikoj en nia nova socio estas disvolvi produkton sed tiamaniere ke tio faras bonojn al ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj.



Angulo de unu el la laborejoj de la Ĉekiang-a Juto-teksejo

“Ni havas laborist-administrantan komitaton konsistantan el reprezentantoj de administracio kaj laboristoj. Ĝi regule kunvenas por diskuti kaj solvi ĉiajn ajn problemojn kiuj eble okazas kaj sur la bazo de unanimeco en niaj decidoj, ni preskaŭ ĉiam glatigis ĉiajn ajn problemojn kontentigante ambaŭ flankojn. Tamen, se interkonsento estas ne atingebla, do ni povas transdoni la aferon al la Buroo de Laboro por arbitracio. Dum la ĉirkaŭ kvar jaroj ekde la liberigo de Tienzino, ni estis devigitaj fari tian peton nur unu fojon.”

Laborkondiĉoj en ĉi tiu fabriko estas tre bonaj, kaj, same kiel en ĉiuj aliaj fabrikoj vizititaj, ankoraŭ konstante plibonigas. Ĉiuj nuntempaj ordinaraĵoj—infanvartejo por infanoj de la laboristoj, sportejo kun ekipaĵo, laborista klubo, kooperativo, publikaj manĝoĉambroj, kuirejo por specialaj manĝoj, loĝejoj, lernej-subvencio por infanoj de la laboristoj, kompleta asekuro kontraŭ malsano, akcidento, morto kaj maljunaĝo, edukaj kaj distraĵoj oportunaĵoj, k. t. p.—troviĝas tie. Laborpagoj estas plialtigitaj, nun egalantaj meznombro al la kosto de 2,000 ovoĵoj aŭ 220 funtoj da bovaĵo pomonate.

Kion Gajnis la Naciaj Kapitalistoj?

Ĉe la fino de la diskutado, unu el la delegitoj elpafis la “ĉefan” demandon: Kia estas via profitosituacio kaj kio okazos al vi kiam socialismo fine venos al Ĉinio?

“Ni laboras laŭ kosto-plusa sistemo,” respondis S-ro Ĉu, “kun profito atinganta 15 ĝis 20 procentojn de la produktokosto. Ni ricevas pli altan profiton el tiuj varoj menditaj de registaraj organizoj, kiaj fabrikoj kaj ŝtataj komercaj kompanioj, ĉar ili estas la aĵoj kiujn la lando bezonas, dum nia profito el altkvalitaj luksaĵoj estas malalta. Plie ni ĝuas specialan malpliigon de imposto de nia neta profito, ĉar tiom da niaj produktaĵoj estas bezonataj varoj. Ekzemple, la plej alta imposto de neta profito estas 30 procentoj, sed nia imposto estas 24 procentoj.

“La neta profito post la pago de imposto estas dividata jene: 10 procentoj estas flanken formetataj por reinvesto, aŭ reprodukto, kiel ni ĝin nomas—por pliaj maŝinoj, laborejeksplando, k. t. p.—kaj 8 procentoj por akciahavantoj.

“La restaĵo estas dividata en 100 egalajn partojn, el kiuj 60 partoj iras al la posedantoj kaj administranta oficistaro kiel superpagoj, 15 partoj estas uzataj kiel superpagoj por laboristoj, 15 partoj por plua plibonigo de sekurigaj kaj ĝeneralaj laborkondiĉoj en la teksejo kaj la restantaj 10 partoj enkasigataj ĝenerala fonduso kies utiligo estas decidata de nia konsiliga komitato. Kelkfoje ni tute ne uzas ĝin. Tiukaze ni transmetas ĝin en la konton de la venonta jaro.”

Ilia Fido pri la Estonteco

Turnante la parolon al la estonteco, S-ro Ĉu diris ke li havas nenian maltrankvilon. “Sub novdemokratio ni havas gravan rolon por ludi en konstruado de nia lando. La nacia burĝaro estas unu el la kvar klasoj reprezentataj en nia unuecfronta registaro. Estos ankoraŭ kelka tempo antaŭ ol nia lando estos sufiĉe disvolviginta por eniri en socialismon, sed mi anticipas ke estos nenia malfacilo kiam tiu tempo venos.

“La ĝenerala vivnormo estos multe pli altigita. Ni ĉiuj vivos pli feliĉe tiam. Sendube mi retenos mian personan proprajn, inkluzive mian aŭtomobilon kaj mian domon. La kompanio Ĵenli jam starigis du novajn fabrikojn depost la liberigo kaj mi esperas eniri en socialismon kiel administranto.

“Mi ne bezonas maltrankviliĝi pri la feliĉo de miaj infanoj nuntempe aŭ estonte. Mia pleja filo estas profesoro pri kemio en kolegio, mia filino instruas pianon en la Centra Muzika Konservatorio, alia filo nun lernas pianon kaj mia kvara infano estas en mezgrada lernejo. Ĉiuj faras kontentige. La du pli junaj estas membroj de la Junula Ligo. Ilia estonteco estas garantiata.”

* * *

Ĉisupre estas la rakonto pri du fabrikoj. Ĝi estas tiel tipa ke efektive la sama rakonto povas esti skribita pri preskaŭ ĉiuj aliaj ŝtataj kaj privataj fabrikoj kiujn ni vizitis en Pekino, Nankino, Ŝanhajo, Hangĉou, Ŝenĵang kaj Fuŝun.

Multaj konkludoj povas esti tiritaj el ĉi tiuj priskriboj. Inter ili du precipe elstaras. Unue, la sistemo, en kiu ambaŭ ŝtata kaj privata industrioj ekzistas flanko ĉe flanko, evidente funkcias kaj videble funkcias bone. Due, la laborantaj viroj kaj virinoj de Ĉinio havas veraĵojn interesojn en la nova socio kaj montriĝas kapablaj efektiviĝi la industriigon de la lando en rekorda tempo.

La Hundoj Bojgis Denove

(daŭrigo de p. 119)

nenian atenton, sed forrapidis kun mia patro puŝante, kaj trenante.

Dum la posttagmezo ni—la tuta familio—manĝis nenion. Mia patrino iris sur la straton de tempo al tempo por informiĝi pri paĉjo. Tuj post vesperiĝo ŝi revenis de la strato; larmoj falis senĉese el la okuloj. Ŝi karesis mian kapon kaj diris: “Pa-va, mia bona filo, restu hejme kaj bone zorgu pri frato, mi iras vidi paĉjon!”

Mi ĉiam obeis la panjon, kvankam mi estis tiam tre juna. Mi restis hejme zorgante pri mia frateto kaj endormiĝis post iom da tempo. Hundbojado sur la strato vekis min el la dormo. Aŭdiĝis paŝbruo kaj tuj malfermiĝis puŝite la pordo. Panjo envenis kaj eklumigis la lampon. Kelkaj el niaj najbaroj enportis iun. Mi alpaŝis kaj rigardis kaj ne povis deteni min de laŭta plorado. Tiu estis mia patro! Li svenis kun fermitaj okuloj. La vizaĝo estis tute kovrita de sango.

La najbaroj kuŝigis lin sur la terliton, diris al ni konsolon kaj foriris. Mi kaj mia patrino sidis apud patro plorante. Patro rekonsciĝis malrapide post tre longa tempo. Kiam li vidis min kaj mian fraton sidantaj apud li plorante, grandaj larmogutoj elfluis el liaj okuloj. Li faris longan spiron kaj diris al ni: “Pa-va kaj Tung-va, restas al mi neniu espero kom tior, ke vi bone kresku plenaĝa kaj venĝu min por la maljustaĵo, kiun mi suferas. Mi jam ne povas plu vivi...” Mi ne scias kiel mi endormiĝis tiunokte. Mia patrino ekleviĝis kaj kaptis min dirante: “Aŭskultu, Pa-va!”

Trans la tegmentrando la matena ĉielo jam paligis. Ĉe la fino de la vilaĝo hundoj ekbojis denove. Patro ankoraŭ kuŝis senkonscia.

LA LABORISTA MALJUNULA HEJMO DE FUŠUN

Taj Jen-nien


En Nordorienta Ĉinio, en la norda parto de Fuŝun kiu ĝuas la nomon de "Karb-urbo", troviĝas bela, trietaĝa konstruaĵo kun ebena tegmento. Kiam venas somero, la densa verdaĵo de la arboj ĉiufanke kreskantaj ĉirkaŭbrakumas la tutan altan konstruaĵon. Proksime antaŭ ĝi kuŝas la pejzaĝa regiono de la urbo—la Orienta Parko kaj la Okcidenta Parko. La tiea fama Hun-rivero preterfluas malantaŭ ĝi.

Sur cement-kolono de la pordego de tiu bela konstruaĵo kun trankvila ĉirkaŭaĵo pendas ruĝa tabulo kun la blankaj vortoj: "La Laborista Maljunula Hejmo de Fuŝun". Tie estas la loko kie la maljunaj laboristoj de Fuŝun en nova Ĉinio ĝoje kaj feliĉe travivas sian maljunecon.

Enirinte la pordegon, oni trovas kelkajn longajn, verde kolorigitajn apog-benkojn en la arbo-ombro en la konstante kvieta korto. Pli antaŭe situas la konstruaĵo de la hejmo kiu konsistas el du interligitaj kavaj kvadratoj. Interne de la domo la blankaj muroj kaj okraj kolonoj kaj traboj aspektas tre puraj kaj belaj. Irante okcidenten laŭ la koridoro de la teretaĝo, oni vidas maldekstre manĝejon kie bonorde viciĝas brilkoloraj tabloj kaj benkoj. Ĉiutage la maljunuloj manĝas ĉi tie bongustajn kaj nutrajn manĝaĵojn. En la dua etaĝo troviĝas klubo aranĝita en tre eleganta maniero. La ceteraj ĉambroj estas dormejoj por la maljunuloj, krom barbirejo, lavejo kaj banejo.

La Maljunula Hejmo de Fuŝun inaŭguriĝis je la 1-a de oktobro, 1949, la tago kiam naskiĝis la Ĉina Popola Respubliko. Tiam estis 52 maljunuloj. La nombro pligrandiĝis ĝis 75 je la fino de la jaro 1952, kaj en tiu ĉi jaro la nombro fariĝos multe pli granda. La neokupataj ĉambroj en la tria etaĝo kiuj povas enteni pli ol cent personojn estas pretigitaj por akcepti tiujn venontojn.

Plejparto de la maljunuloj en la institucio estas maljunaj laboristoj de Fuŝun-minejo. Inter ili estas ankaŭ maljunaj laboristoj el diversaj publikaj fabrikoj de tiu ĉi urbo. Ĉiuj laboristoj, laborantaj en ĉakto sub pli malfacilaj kondiĉoj kaj atingintaj la aĝon de 55 jaroj kaj la laborperiodon de 20 jaroj kaj ĉiuj laboristoj laborantaj ekster ŝakto aŭ en ordinaraĵ fabrikoj kaj atingintaj la aĝon de 60 jaroj kaj la laborperiodon de 25 jaroj, povas eniri en la institucion tie travivi sian maljunecon. Se iuj el ili volas reiri al siaj hejmoj, tiuj ricevas ĉiumonate pension kiu egalas 50-70 procentojn de la laborpago.



Maljunaj laboristoj en la Hejmo fervore legas ĵurnalojn en la klubo.

La homoj, kiuj pasigas sian maljunecon ĉi tie, for-lasas ĉian laboron kaj vivas komforte sub la prizor-gado de la registaro. Iliaj vestoj, manĝaĵoj, loĝejoj—ĉio kion la vivo bezonas—estas provizataj de la ŝtato. En la malnova socio la maljunaj laboristoj neniam povis ĝui tian feliĉan maljunecon. Kiel la maljunaj laboristoj mem diris: "Tio neniam okazis en nia historio kaj ni eĉ ne songis pri tio en la pasinteco."

Ĉaŭ Joŭ-ĉen, 62-jara maljuna laboristo kies ŝultroj deformiĝis pro troa laboro dum juneco, laboradis ĉe Fuŝun-minejo por pli ol 20 jaroj. Li laboris jen en la ŝakto, jen ekster ĝi, kaj li ĉiam kondukis mizeran vivon. Eĉ tia homo kiel li, kiu oferis sian tutan vivon al la minejo, devis ĉiam esti minacata de maldungo antaŭ la liberigo. Dum la tri jaroj de sia 53-jara aĝo ĝis sia 55-jara aĝo, kiam la Manĉukuo-pupoj kaj Kuomintanga reakciularo regis la minejon, li estis trifoje maldungita. Li ne havis hejmon, kaj sen-laboreco signifis malsaton kaj morton al li. Post ripetitaj petoj li akiris laboron kiel ĉionfara servisto. Ĉiutage li devis iri al la montdekklivo por alporti akvon. En vintro glata glacio kovris la montdekklivon. Mal-juna Ĉaŭ Joŭ-ĉen glitfalis kaj sin levis, sin levis kaj denove glitfalis. Li ne havis sufiĉe da forto por alporti akvon sed li devis persisti malgraŭ ĉio. Eĉ tia streĉa laboro ne alportis al li sufiĉe satigan manĝon kaj varman veston kaj li ĉiam nutris sin per brano aŭ fabokuko. Kiam li dormis nokte, li uzis kiel kovrilon sian veston kiun li surportis en la tago, kaj kiel kapkusenon li uzis nur du brikojn....

La Hundoj Bojis Denove

Cuj Pa-va

Kamarado Cuej Pa-va estas 24-jara, juna batalanto en la Popola Liberiga Armeo. Li naskiĝis en malriĉa familio de terkulturisto kaj estis vendita al terposedanto kiel bovopaŝtisto kiam li estis nur infano, ĉar lia patro ne povis pagi la renton. En 1949, li estis perforte varbita de la bandita armeo de Hu Zung-nan, generalo sub Ĉiang Kaj-ŝek, sed baldaŭ liberigita de la PLA.

Kiam li aliĝis al la Popola Liberiga Armeo li eĉ ne scipovis skribi sian nomon. Sub la edukado de la armeo, li lernis tre fervore. Antaŭ la apero de la rapid-lerna metodo li ellernis nur 528 ideografojn. Li tre ŝatis aŭdi rakontojn kaj popolkantojn. Foje li aŭdis kortuŝan historieton de iu batalheroo, li ekpensis: "Se mi scipovus verki kaj surpaperigus ĉiujn suferojn travivitajn de mi, kiel grandan edifan valoron tio havus!"

Aliĝinte poste al la rapida kurso en 1952, li dediĉis la tutan liberan tempon al la lernado kaj persiste konkeris ĉiujn malfacilojn. Leginte la raporton de kamarado Kaŭ Ju-paŭ pri la verkado de sia rakonto "Noktomeza Kokokrio", li pensis ke liaj propraj travivaĵoj ja ne multe diferencas de tiu en la rakonto, do kial li ne surpaperigu kion li volas diri? Sed li trovis ke tro multe li travivis en la malnova socio kaj li ne sciis kiel komenci. Dank' al la pacienca helpo de la kursgvidanto, li verkis post unu monato sian unuan rakonteton, kiun ni publikigas ĉisube. Nun li jam finis aliajn ok rakontetojn. Li diris al siaj kamaradoj: "Mi daŭre verkos pri la doloro kiun mi spertis en malnova socio. Mi ankoraŭ pli zorgeme verkos pri la varmo kaj feliĉo kiujn mi ĝuas en la granda revolucia familio kaj nova socio."

Dum tre longa tempo mi ne povis aŭdi senĝene la bojadon de hundoj. Ĝin ekaŭdante mi tuj konfuziĝis kaj ne sciis kion fari. Mi povis nek sidi, nek stari, sed tremis tra la tuta korpo. Ĉar en mia infaneco, hund-bojo sur la strato ĉiam anoncis la alvenon de la vilaĝaj policianoj de Kuomintang. Ili postulis tirane grenon kaj monon. Je la ekapero en la domo, ili faris teruran impreson per sia demona mieno "kun pufanta barbo kaj elstarantaj okuloj". Tiuj 'grizuloj'* penetris

laŭvice en ĉiun domon, dum la vilaĝaj hundoj ilin postkuris bojante en certa distanco, ĉar ili ne kuraĝis iri tro proksimen.

En marto de tiu jaro, kiam regis malsato en la ĉirkaŭaĵo, Sju, la cent-famili-estro, postulis de ni du dekalitrojn da greno kiel devigan kontribuon. Liaj

* Oni tiel ilin nomis, ĉar ili portis grizajn vestojn.

Nun li estas en la maljunula hejmo. De lia ĉapo ĝis liaj ŝuoj kaj de lia ĉemizo ĝis lia supervesto—ĉio estas nova. En vintro li ricevas vatitan veston dum maldikan veston li ricevas en somero. Li sola okupas unu ĉambron tre bele aranĝitan. Sur la blankaj muroj pendas la bildoj de revoluciaj gvidantoj: Lenin, Stalin kaj Maŭ Ze-tung. Tie estas ankaŭ pejzaĝo-fotoj kaj liaj propraj fotoj prenitaj post lia alveno tien ĉi. Flor-potoj plene okupas la fenestro-sojlon kaj en ili troviĝas ruĝaj kaj purpuraj floroj kontrastantaj kun la verda foliaro. En vitra akvario or-fiŝoj svingadas sian voston.

La Popola Registaro klopodas por ĉiufanka prizorgado de la maljunaj laboristoj. Ilia deziro estas plenumita sub la atento de la registaro. Ĉang Jung-t'ing venis tien ĉi en julio, 1951. Tiam liaj du filoj senpatrinaj bezonis zorgadon. Antaŭ ol li eniris la institucion, li sendis ilin, pere de la Fuŝuna Unio de Laboristaj Sindikatoj, al la infanvartejo, kie ili ĝuis senpagan manĝadon kaj loĝadon. La infanvartejo ankaŭ sendis ilin al la Dependenda Elementa Lernejo de la Fuŝuna Instruista Lernejo. Nun li kondukas ĝajan vivon kaj lia sulkoplena vizaĝo pli kaj pli sereniga. "Ĉio estas nun kontentiga por mi," li diris. "Nia propra

registaro kaj sindikato solvis por mi ĉiujn problemojn."

La vivo de la homoj en la maljunula hejmo estas regula kaj variema. En la mateno, iom rearanĝinte sian ĉambron kaj frotpuriginte la tablon, ĉiu kviete trinkas teon el blanka, porcelana te-kruĉo. Post la deka, la lokaj tagjurnaloj alvenas kaj ili iras al la klubo-ĉambro por aŭskulti novaĵo-legadon aŭ foliumi aliajn librojn aŭ gazetojn. En la posttagmezo, se la vetero estas bela kaj ne leviĝas sablovento, iuj el ili eliras por aĉetado aŭ viziti parencojn kaj amikojn, dum aliaj iras al la teatro por rigardi teatraĵojn aŭ filmon. Ĉe kelkaj lokaj teatroj ili ĝuas senpagan akcepton ĉar ilia sindikato zorgas pri la kosto. Tiuj kiuj ne eliras, ŝakludas aŭ promenas en la korto. Vespere, la radioaparato de la klubo elsendas agrablan muzikon dum la maljunuloj sidas sur sofoj kaj aŭskultas silente, kun fermitaj okuloj.

En printempo, la maljunuloj ŝatas kulturajn florojn. La malgranda korto de la institucio ornamiga per diverskoloraj floroj. Kelkaj el ili ŝatas fiŝ-hokadon. Kiam somero venas, oni ofte vidas en la arbo-ombro surborde de Hun-rivero maljunulojn kiuj sidas fiŝhokante per longaj stangoj kaj kies barbo flirtas en la brizo.

'hundaĉoj' venis ĉiutage por la greno kun ĉiuspecaj minacoj. Mia patro maltrankviliĝis kaj trovis neniun elirejon. Hejme la kaldrono estis malplena kaj la kameno senfajra, de kie oni povus akiri la grenon por doni al ili!

Tiun tagon, la hundoj bojis denove. Mia patro priaŭskultis kaj ĝemspiris kapskuante. Li forte ekscitiĝis. Mia patrino eĉ ne povis elbalti unu vorton pro konfuziĝo. Ŝi donis puŝeton al mia patro kaj montris fingre malantaŭen por ke li ŝteliru tra la malantaŭa pordo. Sed mia patro apenaŭ povis moviĝi en tiu konsterna situacio. Liaj kruroj tremis. Kiam li transpaŝis la pordon, la vojo jam estis barita de la 'hundaĉoj'.

"Ho! Estas via moŝto, cent-famili-estro!" Vidante, ke estas jam neeble sin forkaŝi, mia patro salutis lin kun altrudita rideto.

"La greno certe estas preta?" La vilaĝestro staris antaŭ mia patro kaj postulis de li tujan liveron de la greno kun nenia ĉirkaŭparolo.

"Prokrastu ĝis morgaŭ, cent-famili-estro! Mi nepre portos al vi la grenon post kiam mi forvondos la bovon..." mia patro petegis humilige.

"Neeble!" La cent-famili-estro, celante la vizaĝon de mia patro per fingro, diris kun kunŝovitaj brovoj kaj rondigitaj okuloj: "Vi estas bone konata obstinulo. Neniu rezisto kontraŭ imposto okazis sen vi. Prokrasto! Prokrasto! Ĉu ekzistas limo por prokrasto? Hm! Nepre liveru hodiaŭ!"

"Ho! Ne koleru via moŝto!" Vidante ke la cent-famili-estro flamiĝas, mia patro aldonis petege: "Kiel mi kuraĝus rezisti! Mi efektive havas nenion por pagi!"

"Mi diras al vi, Laŭ Cuej," kriaĉis kvazaŭ freneze cent-famili-estro, "se vi ne pagas hodiaŭ, iru kun mi al la distriktestro!"



La komforta, senzorga vivo en la maljunula hejmo alportas al ĉiuj maljunuloj ĝojon korpan kaj spiritan. Ili dikiĝas en tiuj favoraj cirkonstancoj. Iliaj sulkaj vizaĝoj aspektas brile ruĝaj, montrante signon de bona sano. Multaj el ili, kiuj antaŭe iris nur helpe de bastonoj, nun jam forlasis tiajn ilojn. Li Kuej-ĉun, maljuna barbulo, suferis de severa artrito antaŭ ol li venis tien ĉi. Liaj piedoj estis rigidaj kaj li kuŝis sur la lito tutan tagon. Depost sia alveno, li konstante vizitis la hospitalon por kuracado kaj, krome, ricevis specialan zorgadon de la maljunula hejmo. Tiamaniere, en iom pli ol duonjaro, li jam povis libere sin movi tien kaj ĉi tien.

La plej maljuna membro en la maljunula hejmo nomiĝas Kiang Ji-ting. Li estas 85-jara kaj lia dorso iom kurbiĝas pro troa laboro dum juneco. Tamen, depost sia alveno, li troviĝas en vigla spirito kaj li havas ankaŭ bonan apetiton. Verŝajne li tute ne pensas ke li estas jam tiel maljuna. Konstante li babilas aŭ interdisputas en gaja humoro kun siaj kunuloj, kaj ili ŝerce diras: "Ju pli longe maljuna Kiang vivas, des pli juna li fariĝas." Kvazaŭ naŭva infano, li ankaŭ ofte faras ridindan grimacon kaj ĝoje diras, "La maljunula hejmo ebligas al mi vivi dek aŭ dudek jarojn pli longe."

La 'hundaĉoj', kiuj akompanis la cent-famili-estron kiris vetparole:

"Ne malŝparu vortojn kun li, cent-famili-estro! Unue lin ligu kaj portu al la distrikta administrejo, tiam ni vidu, ĉu li havas grenon aŭ ne!"

"Hm! Li havas nenion! Se li ne havas, lin pendigu per ŝnuro kaj faru al li solidan batadon, tiam li certe havos!"

Ordinare mia patro plej multe malamamis tiujn grizfelajn 'hundaĉojn'. Nun vidante ke ili kriaĉas minace kaj arogante sub la ŝirmo de la cent-famili-estro, li ne plu povis reteni sian koleron kaj diris al ili rekte en la vizaĝo: "Mi nek ŝtelas, nek faras kontraŭleĝajn, kian rajton vi havas bati min?"

Per tio li forte kolerigis la cent-famili-estron kaj liajn 'hundaĉojn'. La cent-famili-estro minacis per fingro al la nazo de mia patro kaj kiris plengorĝe: "Hm! Vi faras nenion kontraŭleĝan? Ĉu bonaj popolanoj iam rifuzis pagi imposton?"

Li faris mansignon al la 'hundaĉoj' kaj diris: "Lin ligu kaj forkonduku!"

La 'hundaĉoj' jetis sin kune sur mian patron. Iu grandulo batis lin pugne sur la brusto tiel forte, ke mia patro premis ĝin per ambaŭ manoj kaj preskaŭ falis teren. Alia fripono kaptis lin je la kolumo kaj trenis lin eksteren. Aŭdante ke oni batas nian patron, mi kaj Tung-va, mia juna frato, jetis nin al panjo por ŝirmo, sed ŝi ne plu povis nin prizorgi. Ŝi forpuŝis nin, kuris eksteren kaj petegis: "Lasu lin, cent-famili-estro! Indulgu nin!" La brutoj donis al ĉi

(daŭrigo sur p. 116)

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 5

EN HAVO

Bildo sur la kovrilo—Mastroj de Sia Lando
(Ksilografajo de Jen Han)

La Nuna Tasko de la Ĉina Laboristaro
Eldoniĝas la Tria Volumo de la Elektitaj
Verkoj de Maŭ Ze-tung

Akra Kontrasto ĉe Panmunjom

La Supereco de la Elekta Sistemo de Nova Ĉinio

Skizo pri Ĉju Juan

Labor-protekto en Nova Ĉinio

Ĉinio Konstruas Ses Modernajn Teksejojn

Rakontoj pri Du Fabrikoj

La Laborista Maljunula Hejmo de Fuŝun

La Hundoj Bojis Denove



La Ĉina Teo

Teo, unu el la ĉefaj trinkaĵoj de la homaro, estas grava kontribuo kiun la ĉina popolo faris al la mondo. Laŭ aŭtentika historia priskribo, la ĉinoj jam komencis trinki teon antaŭ pli ol du mil jaroj. En 780 p. k., Lu Ju, fama ĉina klerulo, publikigis libron "Pri Teo", la unua verko en la mondo kiu sisteme traktis tiun temon. En tiu libro elmontriĝis ke la plantado de te-arbedoj kaj la arto de te-pretigado jam perfekte disvolviĝis tiutempe. "Bonvolu trinki tason da teo" estas ĉiutaga etiketa frazo kiun la ĉinoj uzas tiel multajn jarojn por bonvenigi la vizitantojn. Por la minoritataj nacioj en la borderaj regionoj kies ĉefa manĝaĵo estas viando, teo estas ĉiutaga necesajo helpanta digeston.

Ĉiuj kiuj ŝatas teon scias ke teo stimulas spiriton kaj kvietigas soifon. Trinkinte tason da densa teo post laboro, oni tuj sentas ke ilia spirito refreŝiĝas kaj ilia laco malaperas.

Te-arbedoj estas plantataj en la baseno de Jangze-rivero kaj en diversaj regionoj sude de ĝi. Precipe bone konata estas la teo produktata en la provincoj Anhuej, Fukien kaj Junnan. La specoj kaj nomoj de teo nombriĝas je kelkaj centoj sed laŭ la fundamentaj kvalitoj oni povas ilin klasifiki en kelkajn grandajn kategoriojn: ruĝa teo, verda teo, "nigra-draka" teo kaj flor-aromigita teo.

Ruĝa teo estas preparita el tefolioj per diversaj procedoj de fermentado kaj bakado. La plej fama speco estas tiu produktata en Ĉimen de Anhuej-provinco. Ĝi havas ne nur allogan aromon sed ankaŭ delikatan dolĉecon.

Verda teo estas preparita per sekigado sen fermentado. Tial ĝi tute konservas sian originalan koloron. Ĝia plej rimarkinda kvalito estas, ke ĝi enhavas vitaminon C nedetruoblan sub 200°C. Pro tio la verda teo estas utila precipe por tiuj kiuj malofte manĝas verdajn legomojn (kiel maristoj, k.a.). Multaj specoj de verda teo produktiĝas en Ĉinio kaj la plej bone konataj estas *lungking* kaj *pingŝuĵ*.

"Nigra-draka" teo estas preparita per duon-fermentado kaj estas speco inter la ruĝa kaj la verda. Flor-aromigita teo, kiu havas vastan merkaton en Ĉinio, estas aromigita per aromaj floroj (kiel rozoj, jasmeno, k.t.p.) dum preparado.

Troviĝas multaj metodoj por pretigi teon. En Ĉinio la plej ĝenerala kaj simpla metodo

estas meti ĝin en tason aŭ kruĉon kaj aldoni bolantan akvon. Tiamaniere la delikata aromo de teo povas esti plene retenata.

La eksporto de ĉina teo havas longan historion. Jam antaŭ 1300 jaroj Ĉinio eksportis teon al la nordo (la nuna Mongolio) por interŝanĝi la tieajn fame-konatajn ĉevalojn kaj tiam oni ankaŭ eksportis ĝin al Japanio. En 1906, nederlandanoj komencis transporti ĉinan teon el la ĉina havenurbo Makao al Batavio. En 1886 la tuta kvanto de ĉina teo eksportita atingis 134,000,000 kilogramojn. La tiama eksterlanda merkato ampleksis Eŭropon, Amerikon kaj Afrikon. Sed sub la pli kaj pli reakciiganta regado de Kuomintang, la te-plantistoj kondukis tre mizeran vivon pro pezaj impostoj. Multege da tekampoj estis neglektitaj kaj la produktado treege malplialtiĝis. En 1948, la jaro tuj antaŭ la liberigo, la produkt-kvanto atingis nur kvaronon de la plej alta jara produkto kaj la eksporta kvanto reduktiĝis ĝis 13 procentoj de la plej alta cifero.

Post la liberigo, paralele al la prosperiĝo de ĉiuj aliaj produktaj entreprenoj, tiu situacio jam rapide ŝanĝiĝis. La te-plantistoj ne nur akiris teron en la agrara reformo kaj tiel sin liberigis de la ekspluatado de la bienuloj, sed ankaŭ prunteakiris monon de la Popola Registaro por produktado. La registaro starigis eksperiment-kampojn por helpi ilin plibonigi la teknikon de kulturado, difinis raciajn aĉet-prezojn por plialtigi iliajn enspezojn kaj samtempe establis modernajn te-preparejojn por plialtigi la kvaliton de teo. En Sikang kaj Tibeto kie loĝas naciaj minoritatoj, kaj kie la te-provizo ĝis nun multe dependas de aliaj provincoj, oni jam komencis plantadon de te-arbedoj sub la helpo de la registaro, por tiel suriri la vojon de memsufiĝo.

En 1952 la produktkvanto de teo jam plialtiĝis je 22 procentoj de tiu de 1950. En 1951 la mekanikaj ekipaĵoj por prepari teon plimultiĝis sepoble tiom kiom en 1949. Pro la senĉesa plialtigo en la produktkvanto kaj la kvalito de teo, la eksport-cifero en 1952 plialtiĝis 213 procentojn ol en 1950. Ĉinio, kiu plej frue komencis plantadi te-arbedojn, nun denove povas, krom kontentigi sian propran bezonon, provizi la te-ŝatantojn en ĉiuj landoj per bonkvalita teo en granda kvanto.